Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 26 - trimonata

3/96

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktoro: Jozefo NÉMETH

Vicredaktoro: Katalin SMIDÉLIUSZ

Kunlaborantoj: Stefan MacGILL, Johano KIRSCH, Françoise NOIREAU, Atilio ORELLANA ROJAS kaj Franz-Georg RÖSSLER

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): R. Willeman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende

IPR

Redaktejo: NÉMETH József
HU-8500 Pápa, Kilián ltp. 75/9
☎ + 36-89-315-836

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

ENHAVO

Marija Beloševiĉ: *Instruinda ĉeĥa somero (+ Rezolucio de la Konferenco)*..1
Gabriela Ősz: *Celestin Freinet (1896-1966)*..... 4
Franz-Georg Rössler: *Rikardo Ŝulco fariĝis 90-jara*..... 5
Li Yusheng: *Kiel apliki regulecon de scimemoro en instruado*..... 6
Harald Schmitz: *Esperanto en la lernejo (kelkaj spertoj kaj konsiloj)*..... 8
Vera Barandovska: *Eŭropa Kalendaro 1997-1998*..... 11
El la landoj kaj sekcioj..... 16
Recenzoj (M. Sadler, T. Dahlenburg, K. Smidéliusz)..... 26
Reagoj (Declerck, Green, Nordin, Fenyvesi, MacGill, Nilsson)..... 29
Forumo (Alves Filho, Grosjean)..... 34
Leterkesto (Fenyvesi, R. Gomez, Tuinder)..... 35
Postparolo (Jozefo Németh)..... 36

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: d-ro Duncan Charters, 25 Elsah Hills Drive, Elsah, IL 62028-9750 Usono; tel. 1-618-374-2453, fakso: 1-618-374-5122. Internet: charters@csc1.prin.edu. *Kunordigo, instruista trejnado.*

Vicprezidanto: Brunetto Casini, Casella Postale 213, IT-56100 Pisa, Italio tel. 39 50/48 670, fakso 39 50/50 05 85. *Planado.*

Sekretario: Marija Beloševiĉ, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. (385 1) 576092. Internet: marija.belosevic@public.srce.hr. *Landaj sekcioj, membro-varbado, rilatoj kun UEA kaj la movado, servoj al instruistoj.*

Kasisto: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby. Tel. (46 415) 501 52. *Financo, konferencaj financoj. Membraro.*

Vic-sekretario: Prof. Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normnal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio. *Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio kaj Azio.*

Membro: Mag. Atilio Orellana Rojas, Casilla de Correo 1428, AR-5000 Córdoba, Argentino. Tel. +54-51-520065. *Konferencoj, ekzamenoj.*

Membro: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende, Belgio, Tel. (32 59) 502708. *Eksteraj rilatoj.*

Estrara komisiito: Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono. Tel. (314) 869-2303. *Instruado de infanoj.*

Estrara komisiito: Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25/B, HU-1011 Budapest, Hungario. Tel. (36 1) 201-2342. *Gimnazio de ILEI, trejnado de instruistoj.*

Estrara komisiito: Stefan MacGill, Fácán köz 9/2, HU-2030 Érd, Hungario. *Eldonado*

Observanto (UEA): Renee Triolle, 4 impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio

Instruinda ĉeĥa somero

ILEI DUM LA UK

Jam tradicie ILEI aperadas ĉe la UK-oj kun diversaj programeroj. Plej verŝajne la ĉi-jara kongresejo ne nur al ILEI, sed ĉiuj aliaj mendintoj de la budo liveris tre agrablan tutsemajnan laborejon. La ŝildoj videblis jam de sabata mateno, tion ni ne povis sperti dum pli fruaj UK-oj. Ĉe la budo krom aktualaj informoj pri la aktivado de ILEI, oni povis aĉeti t.n. „intelektan" loterion elpensitan de Géza Kurucz, kiu i.a. provizis la unuan kongresan kurieron per la aparta konkurstasko. Krome oni povis foliumi la ILEI-eldonaĵojn kaj tiujn de IEI.

KUNSIDO DE ILEI-ANOJ

Dum la kunsido estis koncize prezentitaj la atingoj de la Ligo inter du UK-oj. Kiel kutime, surpodiiĝis dudeko da lernolibroj kaj aliaj lerniloj aĉeteblaj en la Libroservo. Pluraj partoprenantoj atentigis pri la atingoj en la sfero de la E-instruado tra la mondo (novaj lernolibroj, lerniloj, projektoj).

TAGO DE LA LERNEJO

Trihoran senpaŭzan programon ne povis ĝui ĉiuj interesuloj pro manko de la spaco. Iuj diris ke tiu programero estis unu el la plej vizitindaj kaj plej bonaj dum la UK. Ĉu tiuj pravas, eble vi mem povos konkludi, se ni nur mallonge prezentos la programerojn.

Tradicia punkto de la „Tago" iĝis la prezento de la eduksistemo de la gastiganta lando. Ĝin prezentis Miroslav Malovec. Sekvis eroj ligitaj al la temo „Rimedoj por bona lernado kaj memlernado de Esperanto": nova video-kurso preparata en Usono de s-ino Harmon, „Rolo de E-radioelsendoj en la memlernado de E-o" prezentis A. Pettyn, motoro de la E-elsendo de Pola Radio.

La lasta kaj plej longa ero estis dediĉita al „Mazi". Pri ĝia historio oni preskaŭ ĉion scias, sed ĉi-foje en la prezentado de Katerina Bodnárová oni povis pli profunde eĉ eklerni kiel uzi la materialojn al kiuj aldoniĝis didaktita libro-ludilo. Ĉe la fino, al la programo tre trafe kontribuis f-ino Emily Barlaston kun memtradukita fabelo „el la reĝa palaco".

Krome, ILEI-anoj aktivis en pluraj sferoj: gvidis konversaciajn kursojn, komitat-kunsidis, partoprenis la unuan forumon de la fak- kaj sciencaj organizoj.

EKZAMENSESIOJ

Duan fojon, la Kongreso de blindaj Esperantistoj gastigis la ekzamensesion. Ĉi-jare abundis ne nur la kandidatoj, sed ankaŭ iliaj scioj estis pli altnivelaj. Grandan penon por la sukcesa sesio faris ges-roj Moerbeek, kiuj ne nur prizorgis la brajligon de la testoj, sed eĉ provizis la kandidatojn per amaso da utilaj informoj.

Ĉe la ekzamenoj aperis entute sep kandidatoj el kvin landoj: 2 ĉe la elementa kaj 5 ĉe la meza niveloj kaj ĉiuj sukcesis. Venontjare oni planas ne nur ripetigi la sesion dum la LIBE Kongreso, sed same proponi ĝin dum la E-kongreso de handikapuloj. La UK-a sesio, kiel kutime, estis la plej nombra: de 16 kandidatoj sukcesis 13 el 10 landoj, inter kiuj 9(10) elementa kaj 4(6) meza niveloj.

Tria sesio okazis dum la ILEI-Konferenco kaj al ĝi aliĝis 7 kandidatoj el 5 landoj, el kiuj 5 sukcesis: 4 je elementa kaj 1 je meza niveloj.

Sume la ekzamenojn sukcese trapasis 25 kandidatoj el 20 landoj (Afriko, Azio, Ameriko-suda, Eŭropo): 15 elementa kaj 10 meza.

30-A ILEI KONFERENCO

Dum la tuta semajno 74 E-instruemuloj konferencis en la ĉeĥa urbo Tábor. La temo de la 30-a ILEI-Konferenco estis „Rimedoj por la bona lernado kaj memlernado de Esperanto". Al la inaŭguro de la Konferenco venis la vic-prezidanto de UEA s-ino Renee Triolle kaj la prezidanto de la Akademio de Esperanto d-ro Werner Bormann. Ambaŭ vizitoj tre ĝojigis la partoprenantaron, ĉar post longa tempo la Konferencon partoprenis la reprezentanto de UEA kaj por la unua fojo oficiale tiu de la Akademio.

Ni nur listigu titolojn de la prelegoj en la espero, ke pluraj iam trovos lokon en IPR aŭ en aliaj E-revuoj: *Instruado en Ganao* (Yaw Frempong), *Kiu proverbojn ne uzas, ties parolo obtuzas* (Till Dahlenburg), *Lerniloj por infanoj verkitaj en Usono* (Ronald Glossop), *E-instruado en Alp-Adrio* (Marija Beloševiĉ), *Lingvo-lernado kiel rimedo de personeca disvolvigo* (Pavla Dvorakova).

Dum la Konferenco funkciis du Mazi-studgrupoj kaj ankaŭ Cseh-metoda C-seminario. Deko da junuloj partoprenis la programon de la 4-a ILEI Gimnazio.

Komitatkunsido ankaŭ ĉi-jare formanĝis belan parton de la programo. Tuj ĉe la komenco, la Komitato unuanime akceptis novan honoran membron, s-inon Mila v.d. Horst-Kolinska - motoro de la „Mazi-projekto". Krom la raporto pri la jaro 1995, la partoprenantoj tre vigle pridiskutis la laborplanon por la jaro 1997 (ĝin vi trovos en iu posta numero de la revuo).

Devigaj estraraj elektoj ankaŭ ĉi-jare alportis novaĵojn. Nova-malnova kasisto iĝis Bertil Andreasson kaj la estraron eniris Raymond Wylleman, belga sekcia estro. Ni uzas la eblecon kaj dankas pro la kunlaboro al la ĝisnuna estrarano Till Dahlenburg kiu forlasis la Estraron.

La Komitato pridiskutis kunlaboron de la Ligo kun movadaj kaj nemovadaj organizoj. Oni notis pozitivan daŭrigon de la kunlaboro kun UEA kaj LIBE, kaj komencon de la kunlaboro kun la Akademio de Esperanto, kun kies prezidanto la Estraro aparte kunsidis. Ni esperas, ke ankaŭ aliaj E-organizoj kiuj estas tre proksimaj al la E-instruado, edukado aŭ kiuj simple donas servojn al kursanoj estonte pli firme ekkunlaboros kun ILEI.

En la sfero de nemovada kunlaboro kun granda atentigo oni aŭskultis la raporton pri la kontaktoj kun UNESKO. Unuanime, la komitatanoj decidis ke la ILEI-

teamo atenteme sekvu la evoluon ĉe tiu organizo. Nova estrarano jam kolektis plurajn utilajn adresojn al kiuj oni baldaŭ forsendos informojn pri ILEI kun la invito al la kunlaboro.

Estis fondita la komisiono pri eksteraj rilatoj en kies kerno eniris ĝisnunaj aktivuloj ĉe UNESKO kaj aliaj nemovadaj instancoj.

La venontjara ILEI-Konferenco okazos de la 27-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1997, en la ĉirkaŭaĵo de Melborno kun la temo „Multkultureco kaj lingvo-lernado". La Gimnazio okazos, se aliĝos sufiĉe da kandidatoj.

La komitatanoj pridiskutis ankaŭ la informkampon de la Ligo. Estis menciitaj pluraj eblecoj, sed ni ĉi tie menciu espereble baldaŭan aperon de la ILEI TTT-paĝo kaj informilo pri la agado kiu estos prilaborita ne nur en E-o, sed ankaŭ en aliaj lingvoj, kio certe multon helpos en la varbado de novaj membroj, kaj diskonigo de la gravaj atingoj de la Ligo en- kaj ekstermovade.

***Marija Beloševiĉ**, sekretario de ILEI*

Rezolucio

La 30-a ILEI-Konferenco, okazinta en Tábor, Ĉeĥio, de la 27-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1996, kun 74 partoprenantoj el 31 landoj de ĉiuj kontinentoj,

– diskutinte la Konferencan temon „Rimedoj por la bona lernado kaj memlernado de Esperanto";

– konsciante pri la minacanta pereo de malpli grandaj lingvoj kaj kulturoj; kaj

– certigante ke la instruado de Esperanto celas demokratian komunikadon, transnacian edukadon, pli efikan lingvo-instruadon, konservon de lingvaj rajtoj kaj diverseco kaj homan emancipiĝon,

alvokas la edukistojn, kunlabore kun Tutmonda Kunagado, per siaj lerniloj kaj kursoj atentigi al kulturaj, sciencaj kaj edukaj UNESKO-programoj cele al paca socio tutmonda,

petas UNESKO-n

a) atenti la klerigan rolon de Esperanto – la sola lingvo memlernebla por ĉiu homo – por internacia kunlaboro kaj reciproka aprezo kaj protekto de ĉies kulturo;

b) helpi en la evoluigo kaj disponigo de Esperanto-lerniloj al membroj de popoloj kaj socigrupoj en malavantaĝaj situacioj.

GABRIELLA ŐSZ:

Celestin Freinet 1896-1966



La centjara datreveno de la naskiĝo de Freinet donas okazon pripensi, kion donis al la homaro la Moderna Pedagogio kreita de li. Kion li faris? Li forĵetis la katedron – la simbolon de la malegaleco – el la klasĉambro, per tio li iniciatis demokratan kunlaboron en la lernejo. Freinet organizis kooperativan sistemon por la infanoj kaj instruistoj. Li okupiĝis pri la en-, kaj eksterlandaj kontaktoj de la edukistoj.

Dum jaroj li prilaboris novajn, modernajn instruteĥnikojn, kaj kiam la malamikoj de la reformoj ne akceptis la novaĵojn, li aĉetis terenon kun malnova domo kaj kun la gelernantoj kaj iliaj gepatroj konstruis lernejon, kie li povis realigi sian edukan koncepton. Sekretoj de liaj sukcesoj: li neniam altrudis desupre siajn metodojn al la infanoj aŭ kolegoj, sed li ĉiam atenteme adaptis siajn planojn al la etoso kaj ekzistantaj materiaj cirkonstancoj, kaj neniam forgesis pri tio, ke la gelernantoj kaj iliaj familioj estas kunlaborantoj. Li rekonis, ke la konoj nur tiam estas valoraj kaj stabilaj por la infanoj, se la infanoj mem esploras ilin. Oni lasu la infanojn eksperimenti, serĉadi, por ke ili povu ekzameni la objektojn plurflanke. La esploro ĉiam donas ĝojon, tio estas rekompenco de la persista laboro. La lernejo devas esti laborejo, kie oni libere faras sian elektitan aŭ devigan taskon. – La tasko povas esti deviga, rilate al instrucelo, sed al la celo povas konduki diversaj vojoj. La vojoj, vojetoj povas esti falsaj, oni povas elekti malbonan vojon, sed la instruisto povas montri alian direkton al la ĉagreniĝonta lernanto. Eble tiel oni perdas tempon, valorajn horojn, eĉ tagojn... Sed fine aperas la rezulto, la mem akirita kono, kiun oni ne povas facile forgesi, kaj kiu instigas la gelernantojn serĉi ĉiam pli novajn celojn.

Alia grava afero, ke la Freinet-klasoj estas veraj societoj. La esploroj de la unuopaj infanoj estas trezoro por la tuta kooperativa klaso. Oni povas studi objekton tiel, ke la individuoj aŭ grupoj ekzamenas ĝin el diversaj aspektoj kaj poste ili resumas la rezultojn. Demokratismo de Freinet-klasoj aperas ne nur en la komunaj laboro kaj respondeco. Tre gravas ankaŭ la reciproka respekto: ĉiu povas diri sian opinion kaj la aliaj aŭskultas lin, ĉiuj estas atentemaj, se iu havas problemon.

La simpla presilo helpis al infanoj en amikeco de aliaj en-, kaj eksterlandaj klasoj. Ĉu naivaj idealistoj estas tiuj homoj, kiuj pensas eviti la militojn per amikeco de diversnaciaj homoj? Ĉu pli bone estas, se oni senespere rezignas pri la ekkono de pensado de alilandaj homoj? Ĉu estis hazarde, ke ankaŭ Freinet proponis uzi E-on por internaciaj kontaktoj?

La metodo de Freinet ne estas senprecedenta, li studis la verkojn de progresaj pedagogoj kaj uzis iliajn rezultojn. Lia merito estas tamen, ke li konstruis kompleksan eduksistemon por eduki homon, modernan civitanon. Ne tio gravas, ĉu ni uzas manan aŭ komputilan presilojn por la kontaktoj; ĉu ni havas multekostajn ilojn por la esplorado aŭ ni mem devas fabriki ion. Gravas nur, ke la infanoj deziru serĉadi, esplori, ke ili estu motivataj.

La lernejo de Freinet en Vence estas nun muzeo, ĝi gardas memoraĵojn pri la pedagogia laboro de Freinet kaj lia edzino. Sed mem la pedagogio ne estas muzea objekto, ĝi disvastiĝis en multaj landoj sen ŝtata apogo, nur dank' al la vojserĉado de kolegoj. Post 30 jaroj de lia morto ni povas diri, ke multaj uzas Freinet-teĥnikojn eĉ se ne konsciante aŭ konfesante tion. Estas aliaj, kiuj uzante kelkajn teĥnikojn jam nomas sin Freinet-pedagogoj. Sed la esenco estas ne nur en la teĥnikoj, sed en la etoso, kiu donas eblecon por konstanta esplorado, kreado, kunlaborado.

En la Freinet-movado E-o povas ludi gravan rolon, ja pere de ĝi la kolegoj povas kompreni unu la alian dum la kongresoj, renkontiĝoj kaj ĝi povas helpi la laborkontakton inter diversnaciaj edukistoj. Franca sekcio de ILEI en la jaro 1982 eldonis libron de Freinet: „Diroj de Mateo". Tiu verko montras la bazajn pensojn de pedagogo laŭ kiu la homo estas parto de la naturo, kaj laŭ kiu la amo kaj estimo estas la ĉefaj iloj de la eduko.

Kiu deziras koni la metodon pli detale, turnu sin al la revuo ICEM Esperanto, kiu aperas kvarfoje jare. Pere de ĝi oni povas havi kontaktojn ankaŭ al la anaro de la Freinet-movado. La revuo publikigas okazaĵojn de la jubileo, estus bone, se la festaj rememoroj enhavus rilatojn al Esperanto, konvene al la intenco de Freinet. Adreso: ICEM Esperanto, FR-44330 Le PALLET, Francio.,

Gabriella Ősz, HU-1116 Budapest, Hengermalom u. 47, Hungario

FRANZ-GEORG RÖSSLER:

Rikardo Ŝulco fariĝis 90-jara

La 12-an de julio Rikardo Ŝulco fariĝis 90-jara. Jam frue konatiĝinte kun E-o, li tamen post sia emeritiĝo povis okupi sin serioze kun la Lingvo Internacia. Sed ekde tiam komenciĝis lia dua vivo kiel esperantisto. Estinta instruisto pri la franca, verkinte jam multon en la germana kaj latinidaj lingvoj, erudicie kaj plenkapable li dediĉis sin al la lingvo de d-ro Zamenhofo. Studinte la strukturon de la planlingvo Esperanto, li aparte atentigis pri jam enradikiĝintaj malglataĵoj same kiel pri aktualaj devojiĝoj. Lige al la verkaro de L. Mimó Espinalt, li

iniciatis la Skolon Analizan, kiu komprenas sin fidela al la dekses reguloj de la Fundamento kiel baza kodo, insistante pri regula, „logika", unueca E-o, por ke ĝi restu universala planlingvo kaj ne disfalu pro facilanima buŝa uzo aŭ persona kapricemo de aŭtoroj.

Tiuĉirilate Ŝulco havas internacian signifon por la tuta E-movado. Same avantaĝe li efikis en la germana medio. Li verkis la pedagogie lertegan libron „Mia amata Esperanto / Mein geliebtes Esperanto" (nun jam en la 4-a eldono), kiu peris multajn anojn al la germana movado. Atenton vekis ankaŭ ekstermovade lia libroforma studaĵo pri E-o kaj Eŭropo „Europäische Hochsprache". Krom la lingvosciencaj verkoj (Ŝulco intertempe fariĝis profesoro de AIS) li multe verkis beletre, tradukis gravajn tekstojn, skribis poemojn (eble poeto karakterizas lin plej bone) - impona, riĉa rikolto de 25 jaroj da intensa, memdona laboro.

Kiel „puristo" li ne ĉie akiris amikojn. Diversajn atakojn li devis travivi - kaj li brile refutis ilin. Sed ĉiam pli da esperantistaro konsciiĝas pri la Ŝulcaj postuloj pri regula, racia lingvaĵo. Lia laboro kontribuis grave al la Esperantaj lingvistiko kaj literaturo.

90-jara, Rikardo Ŝulco ĉiam ankoraŭ estas gardanta sian humuron. Vigle, atente, dialogeme li daŭrigas sian verkadon, lastatempe preparante ampleksan kompilaĵon de artikoloj pri kaj de li. Ja „Vespero jam fariĝas", sed ora, milda vespero kun la kontentiĝo pri utilaj kontribuoj al la Esperanta kulturo. La vespero ankoraŭ longe daŭru. ***Franz-Georg Rössler**, Dudenhofen, Germanio*

LI YUSHENG:

Kiel apliki regulecon de scimemoro en instruado?

Scimemoro estas procezo de la kono far homoj pri objektoj. En instruado la procezo de kompreno kaj posedo de la enhavoj instruataj de instruistoj al lernantoj estas unu el la esprimaj formoj de scimemoro. Tio havas plenutilan valoron en la instrua praktiko.

Por atingi sukcesojn en instruado indas atenti, kiel instruistoj povas influi siajn lernantojn per apliko de scimemora reguleco. Estas do tre bezone studi la regulecon de scimemoro en la instruado. Inter scimemora efiko kaj klareco de celo kaj tasko de la homaj aktivadoj ekzistas intima rilato. Tial oni devas konsideri jenajn vidpunktojn por fortikigi la memorkapablon de la lernantoj dum instruado.

Unue: oni devas intensigi la aranĝon kaj kontrolon de la anticipa preparado de lecionoj antaŭklase. Tio estas bona metodo solvi malfacilajn punktojn en la instruado. Kompreneble la prepara laboro ne okazas antaŭ ĉiu leciono, nur antaŭ tiuj lecionoj, en kiuj troviĝas multaj malfacilaj kaj gravaj punktoj. Kelkfoje necesas sugesto por kompreni la celon de la anticipa preparo; sugesto, kiu intime rilatas al malfacilaj punktoj solvotaj en la sekva leciono. Eksplikante novajn

sciojn, instruistoj povas jam ne nur facile klarigi malfacilajn punktojn, sed ankaŭ helpi ke la lernantoj profunde memoru ilin.

Due: dum eksplikado instruistoj devas ripetadi multfoje la gravajn kaj malfacilajn materialojn per taŭga rapideco kaj iomete alta tono por profundigi la scimemorigan efikon.

Trie: instruante gravajn kaj malfacilajn sciojn, instruistoj povas uzi interesan tropon kaj humuran lingvon, apliki taŭgajn gestojn kaj movojn por intensigi la scimemoron.

Ĉar la scimemora efiko havas intiman rilaton kun la komprena grado, oni instruu laŭ la principo facile komprenebla por la lernantoj kaj en metodo, kaj en lingvo, kaj en movo. Ekzemple, por memorigi la vortojn oni devas klarigi la vortstrukturon - prefikso, sufikso, radiko -; por komprenigi kaj memorigi prononcan ŝanĝon de la vortoj oni devas klarigi la ŝanĝ-regularon de la prononco. Oni povas simpligi komprenon de la scioj al la lernantoj ankaŭ per tropo taŭga por komprenigi la signifon de la interna senco kaj ekstera daŭro en forma logiko.

Cetere, oni devas aparte atenti la uzadon de la tri flankoj: nombro, karaktero kaj pozicio de la materialoj, al kiuj rilatas la scimemora efiko. Jen kelkaj ekzemploj: estas pli bone memorigi samtempe nur trionon aŭ kvaronon de novaj vortoj ol en unu tago enkapigi ĉiujn vortojn de la tuta leciono. Novajn vortojn prefere instruu laŭ diversaj grupoj kun la sama aŭ proksima signifo, kun simila skribo, kun mala signifo, kun komuna temo, kun komuna radiko ... tiel oni povas ellerni ilin pli firme, pli rapide.

Grupo 1: *aviadilo, aeroplano, aerveturilo, flugmaŝino, avio...,*
Grupo 2: *domo, nomo, pomo, homo, komo, Romo, Tomo...,*
Grupo 3: *ridi - plori, nigra - blanka, komenco - fino, iri - veni al - de...,*
Grupo 4: *kapo, vizaĝo, okulo, orelo, nazo...,*
Grupo 5: *lerni, lernejo, lernilo, lernebla, lernanto, lernigi, eklerni, ellerni...*

En unu leciono estas kvardek aŭ kvindek vortoj. La antaŭaj kaj la lastaj el ili estas facile memoreblaj, sed la mezaj estas malpli facile lerneblaj. Pro tio oni povas komenci la lernadon ekde la meza parto, aŭ enkapigi la vortojn grupon post grupo.

La scimemora efiko havas intiman rilaton al diversaj sensoj: vidado, aŭdado, tuŝado... tial la instruistoj aparte aktivigu la sensojn de la lernantoj. La efiko certe estos pli bona. Ekz. praktika leciono pri metallaboro, elektroteĥniko, torniteĥniko en la teĥnika laborejo okazas ordinare en la praktikejo; la instruistoj devas kombini eksplikadon kun ekzercado: unue ili prezentas la ĝeneralan postulon de tiu ĉi leciono kaj montras koncernan televidan instrufilmon, due ili klarigas la necesajn sciojn, poste ili demonstras al siaj lernantoj la laboron, fine la lernantoj mem laboras konkrete, por ke ili bone memoru la sciojn. La praktika instruado estas la plej bona praktiko, plej eble mobilizanta la lernantojn en sia uzado de sensoj. Tio estas same ankaŭ en teoria instruado.

En la verka instruado de la ĉinlingvaj kaj literaturaj lecionoj troviĝas la menciita okazo. La verka ekzercado de la lecionoj estas spertado de la lernantoj en la scioj kaj povo. En verk-ekzercado la lernantoj faras pensan proceson de la decido ĝis la skribado. En la verkado - de la komenco ĝis la fino - ili ne nur kombinas sian vivon, konon pri la socio, fidon kaj mondkoncepton, sed ili ankaŭ fandas siajn sentojn kaj impresojn en la verkaĵojn per retorikaj metodoj de komparo, memorigo, fantazio, hiperbolo, kontrasto, ktp.; kaj samtempe esprimas siajn sentojn kaj impresojn uzante racian sintakson per forta volo kaj alta atento. Pro tio verkado estas praktikado de sinteza kapablo. Tio ne povus esti plenumita nur per agado de la sensoj. Se la instruisto estas lerta gvidanto, uzanta la rimedojn de elektraj instru-instalaĵoj, de objekt-elmontroj, de vizito kaj aliaj, li/ŝi povas pligrandigi la vidkampon de la lernantoj, fortigi ilian psikologian eksciton, por ke ili ne restu ne-koncernatoj, sed travivu sian rolon dum la verkado. La instrua efiko certe estos tute malsama.

Estas klare: kaj en la teoria, kaj en la praktika instruado oni pligrandigas la kapablojn kaj talentojn de la lernantoj per mobilizado de harmonia aktivado de aŭskulto, rigardo kaj skribo; per analizo, indukto, sintezo far iliaj cerboj, por ke restu profunda signo de la scioj en ilia kapo. Tiel oni ricevas bonan scimemoran efikon. Konkreta esprimiĝo de la scimemora reguleco en la instruado estas absoluta. Tio devus esti la ĉefa enhavo de porinstruistaj studoj. Ĝi havus netakseblan signifon en la altigo de la instrua kvalito.

HARALD SCHMITZ:

Esperanto en la lernejo - *kelkaj spertoj kaj konsiloj*

Tri monatojn post mia esperantistiĝo en 1987 mi komencis instrui la internacian lingvon en Kolonja gimnazio, Germanio, okaze de projektsemajno pri „alternativaj lernmetodoj". Kompreneble tio estis iom aventura entrepreno, sed kun la helpo de ***Tesi*** kaj la sperta samideano Martin Haase la afero iel sukcesis. La 20 gelernantoj simple akceptis, ke mi estis kvazaŭ samkursano, ili korektis miajn sciigojn sur la „nigra breto" (plejparte per mankantaj akuzativaj *n*-oj), tradukis ***Werner*** kaj ***Asteriks*** - komiksojn por la prezento-tago kaj eĉ verkis germanan-esperantan rakonteton pri ***Kolbasetido***, la ekstertera estaĵo, kiu vizitas nian planedon kaj ege miras pri nia nesolvita lingva problemo.

En retrorigardo ĉi tiu agado ŝajnas al mi preskaŭ ideala komenco de E-kurso en lernejo. Ĝi estis intensa (kvin lecionojn tage) kaj okazis dum la matena oficiala lernotempo. Laŭ mi intensa kurso ebligas plej bone montri unu ĉefan trajton de nia lingvo, nome ĝian relative facilan kaj rapidan lerneblecon. Post unu semajno laborema junulo povas lege kompreni jam multon, helpate de vortaro skribi unuajn tekstojn kaj havi bazan konversacion pri personaj detaloj, t.e. nomo, aĝo, familio, naskiĝdato, hobioj kaj bonfarto. Kaj, sufiĉe mirige por la plimulto, la 16-regula gramatiko estas preskaŭ komplete enkondukita.

Sed bedaŭrinde ne ĉiujare oni organizas projektsemajnon kun taŭga supertemo, je kiu eblas starigi E-kurson. Tamen oni povas komenci per intensa kurso, kvankam iom alimaniere: Elektindas semajno kun malmultaj (lernejaj) kromaktivecoj, ekz. en la Rejnolando la tempo post karnavalo je la fino de februaro aŭ eko de marto, kiu estas taŭga por instrui nian lingvon dum tri sinsekvaj posttagmezoj, dum po tri horoj.

Antaŭa perafiŝa kaj buŝa varbado en la lernejo certigu, ke almenaŭ deko da lernemuloj troviĝu en via instruĉambro. Idealaj por la varbado cetere estas la lecionoj, en kiuj vi devas anstataŭigi gekolegojn kaj kiam vi povas paroli pri Esperanto kaj interalie atentigi pri la planita kurso.

La vera laboro komenciĝas post la intensa kurso, vi devas vivteni la intereson kaj multnombran partoprenadon de la gejunuloj. La bazo por tio povas esti regula laborgrupo kun unu plena horo aŭ du lecionoj semajne. Kompreneble pliaj rapidaj lingvaj sukcesoj tiel ne atingeblas. Unufoja lernado po semajno, ofte vespere, simple ne sufiĉas. Do, se iel eblas, la gelernantoj baldaŭ partoprenu ankaŭ eksterlernejajn kursojn, ekzemple semajnfinon por progresintoj. GEJ ofertas tiaĵon regule (ekz. en Bonn), sed ankaŭ la t.n. kafoklaĉoj, kulturaj semajnfinoj kaj similaj renkontiĝoj estas taŭgaj aranĝoj. „Taŭga" ĉi tie signifas malmultekosta, relative proksima kaj plena je aliaj junuloj. (Ĉar la kutimaj lokaj klubvesperoj kun longjaraj, parolegemaj, foje ĝisostaj samideanoj ne ĉiam estas la ideala allogaĵo por 15-jara komencanto!) Se vi havas tempon kaj energion, vi kiel instruisto, akompanu vian ŝafareton al tia kurso. Ofte ege indas sperti alian instruiston ĉe la laboro por kopii novajn metodikajn ideojn.

Aliaj instigiloj por ligi vian grupon al la movado estas grupa aŭ individua korespondado kaj la abono de magazino kiel ***Juna Amiko***. Por pli ol 6 jarabonoj oni pagas nur po 9 gmk por 1995.

Laŭ mia propra sperto tre valoraj je la lerneja agado estas vizitoj de (eksterlandaj) samideanoj, kiujn oni - se iel eblas - ĉiam invitu al la lernejo. Ekzistas multaj eblecoj por havigi al si gastojn kiuj parolas la internacian lingvon:

Aliĝo al *Pasporta Servo* daŭre estas tre rekomendinda afero! Same la *Amikeca Reto* de SAT taŭgas por „allogi" e-istojn. Eble vi jam havas multajn personajn ligojn al ekstergermanaj gesamideanoj, ekz. korespondamikoj, kiuj ŝatus unu tagon vidi vin. Post internaciaj aranĝoj kiel PSI, IS aŭ IF eksterlandanoj ofte planas daŭrigon de restado, vojaĝas tra Germanio kaj volonte subtenus vin je via loka aŭ lerneja agado. Nepre menciendaj kaj ege bonaj estas la servoj de Wolfgang Loose, la respondeculo de GEA pri rondvojaĝoj. Li peras al vi gasto(j)n, kiu(j) prelegas pri sia lando, muzikumas, prezentas teatraĵon aŭ magiaĵon k.s. en via klubo kaj laŭ interkonsento kompreneble ĉe via instruista laborloko. Similajn aktivecojn lastatempe organizis s-ro Uwe-Joachim Moritz kadre de IKEL.

Sed kiel nun konkrete utiligi gaston lerneje ?

Fremda persono en via instruista ĉambro per si mem vekas la intereson de la ĉeestantaro. Ili simple aŭdu kaj spertu, ke oni povas tute nature kaj flue konversacii en tiu „artefarita lingvo". Sed bonvolu ne agi kiel laŭtparolilo aŭ promenanta varbomaŝino: la nerekta, nealtrudema maniero efikas pli ol dumpaŭza laŭtega prelegeto pri la „plej facila ilo de internacia komunikado kun nur 16 reguloj" ktp. Kolegoj, kiuj vere volas ekscii ion pri la lingvo kaj la gasto faros tion el propra instigo.

Depende de viaj fakoj kaj lerneja tipo la gasto kompreneble partoprenu viajn proprajn lecionojn. Rimarkendas, ke samideanoj ofte regas pliajn fremdlingvojn krom la internacia, do ankaŭ ili povas rakonti pri si mem kaj Esperanto en franca, angla aŭ hispana lecionoj. Aparte junaj geknaboj en la 5-a kaj 6-a klasoj (ĉ. 11-jaraj) ĝojas apliki siajn limigitajn konojn de ekz. la angla, demandante la nomon, aĝon kaj aliajn personajn detalojn.

Cetere, preskaŭ en ĉiu klaso troveblas lernantoj, kiuj diverskiale (denaske, pro azilpeto aŭ militfuĝo, ...) parolas plurajn lingvojn. Kial ekz. bosniano ne traduku la vortojn de via gasto el eks-Jugoslavio al sia klaso helpe de la serbokroata?

Se tute ne ekzistas komuna lingvo inter viaj gelernantoj kaj la vizitanto, vi mem povas ja traduki uzante E-on. La ĉefa celo estu, ke via leciono riĉiĝu per la ĉeesto de la gasto, lingve, kulture aŭ pro interesaj rakontoj.

Kun taŭga lernogrupo eblas dum parto aŭ tuta leciono fari E-kurseton: Team-instruante kun la gasto vi prezentas la lingvan materialon dialoge kaj tiam grupe aŭ individue ekzercas kun la klaso. Ekzemple vi demandas la antaŭnomon de via gasto kaj li/ŝi diras ĝin al vi kaj la grupo. Ripetu tiun dialogeron du, trifoje, skribu la frazon kaj respondon sur la tabulon kaj tiam vi kaj la kuninstruisto iru tra la klasĉambro demandante unuopajn lernejanojn.

Loĝloko kaj familia nomo povus esti la sekvaj paŝoj. Enkonduku la nombrosistemon kaj la nombrojn eble ĝis cent kaj daŭrigu kun la strukturoj „aĝo" kaj „gefratoj". La lernantoj miros je la fino de via minikurso, kiom kaj kion ili jam scipovas diri.

Alia ideo estas ĝustatempe alparoli gekolegojn, ĉu ili ne ŝatus vigligi lecionon per eksterlanda gasto. Ili ne necese devas instrui fremdlingvon. Mi bone memoras la vizitojn de *István Kabók* kaj *Lena Karpunina*. Kelkaj instruistoj de historio, politiko kaj geografio decidis „uzi" ilin por fari spontanean lecionon pri Taĝikistano respektive la situacio en eks-Jugoslavio kaj de la hungarlingva minoritato de la madjaroj. Mi organizis kadre de mia laboro liberajn lecionojn kaj tradukis esperante-germane dum la prelegoj, lumbildprezentadoj kaj postaj diskut- kaj demandorondoj. La klasoj kaj gekolegoj estis kontentaj kaj esprimis diversokaze sian surprizon, ke „ĉi tiu lingvo ja vere funkcias!"

Kelkfoje oni havas lernantojn, kiuj scipovas la internacian lingvon aŭ havas alian komunan lingvon kun la gasto. Por iom senŝarĝigi vin mem ili povas

transpreni lin/ŝin de vi dum certa tempo, traduki, montri la lernejon ktp. Apenaŭ menciendas, ke vi enkonduku la gaston al E-laborgrupo, se tiu ekzistas ĉe vi.

El la multnombra aro de problemoj en la lerneja kunteksto mi alparolu nur du: Plejofte lecionoj kaj kursoj en E-o okazas ekster la normalaj instru-tempoj, do aŭ fruposttagmeze, kiam la grupanoj verŝajne estas lacaj kaj malsataj, aŭ vespere, kiam partoprenantoj denove devas veni al la lernejo, kiam eble malhelas, malbonveteras ktp. Tiam montriĝas ke je E-o kiel nedeviga fako oni troviĝas sur la „libera lernomerkato". Ankaŭ en kursoj de la popola altlernejo la nombro de kursanoj falas dum la monato; kaj sincere dirite: mi ne ŝatus elprovi, kiom da lernantoj venus al miaj lecionoj de matematiko kaj la angla, se ili ne devus partopreni devige! Vere mi preparas la ĉiulundan horon de mia laborgrupo multe pli diligente kaj varimateriale ol normalan lecionon, simple por teni la intereson kaj ĉeeston.

Malfacilaĵo estas la manko de kunlaborantaj kolegoj. Kutime oni jam ĝojas, se ili ne atakas aŭ priridas onin pro la „stranga hobio", kaj ne disvastigas la konatajn stultaĵojn pri la internacia lingvo. Veki la intereson aŭ eĉ kunlaboremon estas verŝajne rara okazaĵo. Tamen oni ne ignoru ĉi tiun aspekton: dua e-isto en la instruistaro (aŭ verdlingve sperta(j) geknabo(j)) signifas grandegan helpon, kiam temas pri reciproka subtenado kaj motivigo, anstataŭado dum malsano kaj se vi planas oficiale instrui nian karan lingvon. Ĉar mi aŭdis kiel argumenton kontraŭ E-o kiel elektebla fako en la matena lernoplano, ke je morto aŭ grava malsano de la instruanto oni ja ne povus trovi anstataŭanton surloke por daŭrigi la instruadon. Mi estus tre dankema al vi pro reagoj, komentoj, propraj spertoj kaj konsiloj je tiu temo. Oni ja ne devas ĉiam denove re-malkovri mem la radon, sed pli bone estas ankaŭ profiti de la spertoj de aliuloj. Bonvolu skribi al mia privata adreso aŭ al la redaktoro.

***Harald Schmitz**, Christophstr. 10, DE-50259 Pulheim, Tel.: 02238-56089*

Eŭropa Kalendaro 1997-1998,

instruhelpilo ne nur por la lingvo-orientiga instruado

Eŭropa Unio oficiale agnoskas, ke ĉiu eŭropano devas lerni minimume unu, sed pli bone du ĝis tri fremdlingvojn. Tial oni en multaj landoj komencas instrui la unuan fremdligvon jam dum la unuaj lernojaroj, forrabante de la infanoj aŭ la tempon bezonatan ankoraŭ por lerni la propran lingvon, aŭ ilian liberan ludtempon. Kontraŭe al la kutima (kaj sensenca) plifruigo de la instruado de fremda etna lingvo la tielnomata „lingvo-orientiga instruado" (LOI) celas per iu taŭga preparado de la lernanto plifaciligi la lernadon de la angla (aŭ alia etna) lingvo. Kompreneble, ankaŭ LOI postulas certan lerntempon. Por pruvi ĝian taŭgecon oni povas starigi du konkurencajn grupojn. La unua grupo tuj komencas lerni la anglan lingvon, la alia grupo dum la sama tempo ankoraŭ ne lernas la anglan, sed ricevas certan lingvo-orientigan preparon kaj komencos lerni la

anglan pli poste. Tiam ĉi tiu prepar-instruado efikas tiel, ke la posta lernado de la angla estas pli facila. Tio signifas, ke post certa tempo la grupo ĝuinta lingvo-orientigan instruadon preterkuras la konkurencan grupon sen preparo startintan. Kompreneble ambaŭ grupoj pro la lerntempo jam antaŭe elspezita daŭre superos siajn samaĝulojn, kiuj lernas la anglan tradicimaniere. Sed nur la grupo ricevinta lingvo-orientigan instruadon, ekde certa kompetentecnivelo en la angla lingvo, ŝparas pli da tempo ol ĝi antaŭe estis elspezinta. Kial? Ĉar la antaŭ-informo plifaciligas la lernadon de instruaĵo tiel, ke la progreso de la orientita grupo estas pli granda.

Por facile klarigi tian fenomenon oni uzu simplan ekzempleton: Kiom da tempo bezonus la „neorientita" leganto por parkeri jenan frazon: *Alicaf ilp satse odanrel al*? Eble unu minuton? La „orientigo", kiu daŭras kelkajn sekundojn, instruas la leganton, ke oni legu de malantaŭe - kaj jen la frazo estas lernebla en ono da tempo. La „orientigo" do konsiderinde plifaciligis la lernadon per malpligrandigo de informo kaj sekve malplilongigo de tempo bezonata por lerni. La samon celas LOI, prezentante antaŭ la komenco de la fremdlingva instruado taŭgan instrumodelon, plifaciligantan la postan komprenon de lingvostrukturoj. En la instruado de natursciencoj oni jam delonge uzas pedagogie taŭgajn modelojn de la instruaĵo antaŭ ol prezenti la aĵon mem. Oni malŝparas iomete da tempo por prepari la lernanton al nova instruaĵo, kiun li tamen laŭ la modelo pli bone komprenas kaj tiel ŝparos multe pli da tempo poste. La modelo, uzata dum la instruado, devas esti: **simpla**, por ke ĝi ne atentigu pri kroma informo, kiu ne estas esenca por la instruinda strukturo; **regula**, por ke ĝi ne atentigu pri esceptoj kaj diferencoj de iu paradigmo; **disigebla**, tiel ke oni dise povu instrui la lernelementojn, eĉ se ili estas en la objekto interplektitaj.
Se temas pri la modelo de lingvo, ĝi devas do enhavi ĉion, laŭ kio oni komprenu ĝenerale, el kio konsistas la lingvostrukturo kaj laŭ kiaj reguloj la lingvo funkcias. Ĝi do havu, se temas pri eŭropeca lingvo: klarajn gramatikajn kategoriojn, facilan, senesceptan, superrigardeblan fleksion, logikajn kaj regulajn vortmodelojn, unusignifajn radikojn kaj aglutinan vortkreadon, firmajn gramatikajn regulojn.

La modelo ĝenerale ebligas kreadon laŭ lernita algoritmo, do aktivecon de la lernanto surbaze de firmaj reguloj. Klaras, ke kiel modelo por lingvoinstruado taŭgas nur logike konstruita lingvo, do planlingvo. La Internacia Lingvo de D-ro Esperanto estas tia pedagogie taŭga modelo, estante simpla, regula kaj disigebla pro sia aglutineco, ebliganta rekoni ĉiujn elementojn. Tial ĝi estas modelo facile lernebla, malfermanta la lernkapablon de la lernanto por fremdaj lingvoj. Kontraste al la E-instruado LOI ne baziĝas sur la supozo, ke E-o estu antaŭvidita komuna dua lingvo por Eŭropo kaj tiam taŭga instruaĵo jam por la elementa lernejo. LOI utiligas anstataŭe la facilecon de tiu ĉi planlingvo por veki helpe de tiu lingvomodelo (kiu tiucele ne estas komplete lernenda) komprenon por lingvaj strukturoj kaj intereson por fremdlingvoj.

Ĝuste por la posta lernado de la angla kaj precipe de romanaj lingvoj taŭgas E-o kiel propedeŭtiko, ĉar ĝia vortprovizo enhavas ĉ. 70% da „internaciaj" vortoj, kiuj dank' al la komuna kultura heredaĵo troviĝas en la plejmulto de la menciitaj etnolingvoj. Ili ĉefe devenas de la latina, de kie ili estis transprenitaj kaj kultivataj per eŭropaj nacioj, kelkaj tamen estis transprenitaj rekte de la angla. Por la lernanto poste validas lingvistika transfero, se li do devas ekz. analizi vortojn kiel *bird, street, help, learn, soup*, nomojn de la monatoj, numeralojn ktp., li ne plu bezonas lerni la signifon de koncernaj vortoj. La ĉefajn gramatikajn trajtojn, do ekz. vortkategoriojn, fenomenojn de konjugacio, komparado ktp. la lernanto jam ankaŭ pli bone komprenas ol se li devus fari komparon kun la propra gepatra etnolingvo, kiu enhavas aron da malregulaĵoj kaj esceptoj. Tiel oni logike ŝparas tempon kaj energion dum la orientita instruado de la angla aŭ de alia eŭropa lingvo.

Jam antaŭ praktika pruvo de la menciitaj klerigkibernetikaj teorioj ekzistis propedeŭtikaj eksperimentoj kun E-o. En la dudekaj jaroj de nia jarcento (komenco de la eksperimento estis 1919) uzis ĝin knabina mezlernejo en Durham, Britio, por poste pli bone lerni la francan. Unu klaso lernis duonjaron E-on, la paralela klaso lernis samtempe la francan. Sekvan jaron lernis ambaŭ klasoj la francan kun la rezulto, ke la E-klaso procedis pli rapide kaj pli kompreneme.

Pli vastan eksperimenton organizis en la jaroj 1928-1931 IALA (International Auxiliary Language Association) sub la gvidado de Helen S. Eaton en Usono kaj en Eŭropo. Observataj estis la efikoj de LOI al la postaj rezultoj en la angla (do la gepatra lingvo) kaj en la fremdlingvoj la franca kaj la latina. En la supera lernejo en Novjorko lernis la eksperimenta klaso E-on laŭ speciala lernolibro de H. S. Eaton, la paralela klaso lernis la francan laŭ speciala metodo, kaj la tria klaso la francan laŭ klasika metodo. Dum la sekvanta lernojaro, kiam ĉiuj tri klasoj samkvalite lernis la francan, estis ĉe la E-lernintoj observataj pli bonaj rezultoj kaj en la gepatra, kaj en la fremdlingvoj.

Similan eksperimenton, kun helpo de precizaj testoj pri ĝenerala kaj verbala inteligenteco, organizis dum kvar jaroj (1947 -1950) J. H. Halloran en gimnazio en Sheffield, Britio, kun kvar klasoj, do proksimume kun 120 lernantoj. La specialaĵo estis, ke la kvar klasoj reprezentis po du inteligentec-nivelojn (ĝenerala kaj verbala), el kiuj ĉiam unu ricevis LOI, kaj la dua, saminteligenta, la instruadon de la franca. Post la posta komuna lernado de la franca ili estis zorgeme ekzamenitaj - la testoj enhavis tradukon el kaj en la francan, komprenon de aŭdita kaj de skribita tekstoj, gramatikan, leksikan kaj konversacian parton. La plej interesaj rezultoj montriĝis en la testo pri vortprovizo - la lernantoj devis serĉi korespondantajn tradukojn de francaj vortoj en la gepatra lingvo kaj krome kompletigi mankantajn vortojn en fremdlingvaj frazoj. Ĉe la du grupoj kun pli granda inteligenteco estis la rezultoj similaj - do kaj la frua lernado de fremdlingvo, kaj LOI estis samavantaĝaj, sed ĉe malpli inteligentaj grupoj estis la rezultoj de E-lernintoj pli bonaj ol ĉe la lernintoj de la franca.

En finnlanda urbo Somero oni organizis instruadon de E-o kiel unua fremdlingvo en mezlernejo en la jaroj 1958-1963 por observi, ĉu ĝi helpas en la posta studado de la germana. Kiel la unua fremdlingvo en paralelaj klasoj estis instruataj ankaŭ la angla kaj la germana. La rezultoj de la observataj studentoj post dujara studado de la germana ne estis malpli bonaj ol de tiuj, kiuj lernis la germanan unu jaron pli longe. Krome oni observis pli aktivan kaj kreivan studaliron kaj pli grandan memfidon de la „orientitaj" lernantoj.

La lastan de la serio de antaŭkibernetikistaj eksperimentoj faris la hungara interlingvisto István Szerdahelyi en la jaro 1970. Li havis je dispono klason da hungarlingvaj lernantoj, kiuj unue estis lernintaj E-on, kaj poste la grupo dispartiĝis por lerni aŭ la rusan, aŭ la germanan, aŭ la anglan, aŭ la francan. Pro la antaŭa LOI la grupo lernanta nun la rusan havis 25%-an plifaciligon. La redukto de malfacilo de la germana estis 30%, de la angla 40% kaj de la franca eĉ 50%, do resume oni ŝparis ĉ. 250 intruhorojn en la mezlernejo.

En la sama jaro komenciĝis sub la gvidado de Prof. Szerdahelyi la unua kvinlanda eksperimento - partoprenis Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio kaj Jugoslavio, kun la celo pruvi, ke E-o estas ne nur taŭga propedeŭtiko por la lernado de fremdlingvoj, sed helpas pli bone regi ankaŭ la gepatran lingvon, estante krome pli facile lernebla ol etnolingvoj. Post la trijara lernado en koncernaj landoj estis unuece testitaj la konoj de la lernantoj kompare kun la lingvoj germana, angla, itala kaj rusa. Evidentiĝis, ke la lernantoj multe pli bone scipovis esprimi sin en E-o ol en aliaj, samlonge studataj fremdlingvoj.

La dua kvinlanda eksperimento komenciĝis en la jaro 1975 kun partopreno de lernantoj el Belgio, Francio, Grekio, Germanio kaj Nederlando. La akiritaj konoj estis kelkfoje testitaj kaj pruvis pli facilan lerneblon de E-o kompare kun la angla. En Germanio partoprenis la eksperimenton laŭ „paderborna modelo" en la jaroj 1975 -1984 sescento da lernantoj de elementa lernejo. La precipaj ecoj de la modelo, ellaborita en FEoLL (*Forschungs- und Entwicklungszentrum für objektivierte Lern- und Lehrverfahren*) estis: lingvo-orientiga instruado okazis en la tria kaj kvara lernojaroj dum po du horoj semajne. Oni uzis aŭdvidajn metodojn, diversajn didaktikajn helpilojn kaj maŝinojn. Ne estis instruita la tuta lingvo, sed por la infanoj taŭga parto de la gramatiko kaj vortprovizo. Instruataj estis lernantoj de diversaj gepatraj lingvoj, tiel ke ili povis baldaŭ interkomuniki en la lernita lingvo.

Ankaŭ ĉe germanaj lernantoj evidentiĝis, ke la rezultoj ne nur en la angla, sed ankaŭ en la gepatra lingvo estas ĉe „orientitoj" pli bonaj. Kiel kromrezulto helpis LOI ankaŭ en matematiko, ĉar la lernantoj ne timis logike pensi, dedukti kaj uzi algoritmojn, kiel ili lernis en la senescepta lingvo, kaj eĉ en geografio, ĉar la lernantoj interesiĝis pri landoj, kie oni lernis ankaŭ la samon (kaj kun kiuj oni korespondadis). LOI kreskigis la intereson de la lernantoj ankaŭ pri la eŭropaj lingvoj kaj ilia parolantaro, kio estis alia pozitiva kromrezulto. Lernantoj ne partoprenintaj LOI-n en la elementa lernejo bezonis ĉ. 35% pli da tempo ol

lernantoj post dujara LOI por atingi la saman nivelon en la angla lingvo, kaj ĉ. 20% pli ol tiuj, kiuj partoprenadis LOI dum unu jaro. Aliel kalkulite, 160 studhoroj da LOI kaŭzis ĉe la posta instruado de la angla lingvo ĉ. 26%-an redukton de la bezonata lerntempo, 80 studhoroj ĉ. 17%-an redukton.

Surbaze de tiuj ĉi spertoj eblas legitimi la jenajn klerigpolitikajn rekomendojn:

- en eŭropaj elementlernejoj okazu dum la tria kaj kvara lernojaro LOI anstataŭ la tro frua instruado de etna fremdlingvo,
- lernantoj, kiuj montras nesufiĉan progreson en la poste instruata etna fremdlingvo, estu liberigitaj de ĝi kaj anstataŭe ricevu komunikadkapablon en la Internacia Lingvo (kiu ĝis nun servis nur por LOI),
- ĉiuj aliaj lernantoj havu en mezlernejo la eblon ne nur lerni (pro LOI pli rapide) almenaŭ du eŭropajn etnolingvojn, sed ankaŭ libervole perfektiĝi en aktiva lingvouzo de la Internacia Lingvo.

Tiuj ĉi rekomendoj radikas en la teorie kaj empirie bazitaj ekkonoj pri la lernfacileco, kiun eblis atingi por la simple, regule kaj modulare evoluigita planlingvo sen perdo de esprimpovo, kaj pri la lernplifaciligo, kiun kaŭzas la propedeŭtika instruado de la internacia lingvo (kiel fremdlingvomodelo pedagogie taŭga) por pli rapida lernado de etnaj fremdlingvoj. Krome, LOI kreskigas la kapablon almenaŭ kompreni plurajn eŭropajn fremdlingvojn kaj pli efike uzi ilin. Menciindas ankaŭ la eblo ricevi tiel konkretan opcion por la komuna eŭropa interkompreniĝlingvo, pri kies ekzisto oni tiom multe teoriumas.

Tiujn argumentojn antaŭ nelonge akceptis la Radikala Asocio en Romo, farante el ili parton de sia politiko. Kadre de sia jarĉefkunveno en la jaro 1993 Radikala Asocio kunvokis eŭropajn politikistojn kaj la fakulojn pri LOI por pruvi, ke oni fakte povas helpi solvi la nuntempan eŭropan lingvoproblemon. Sekve de tio en la sama jaro LOI oficialiĝis en Italio, kaj ekuziĝis la nova lernolibro de Elisabetta Vilisics Formaggio - iama kunlaborantino de la paderborna Instituto pri Kibernetiko. La lernolibro „Ludu kun ni" enhavas ĉarmajn bildetojn kaj facilajn teksterojn, laŭ kiuj la infanoj vere ludante kaj malstreĉite lernas. Eldonis ĝin Radikala Asocio, Via di Torre Argentina 76, IT-00186 Roma, en la jaro 1994.

Kiel aldonan instruilon LOI por elementlernejanoj aperigadis Eŭropa Klubo en Paderborn Eŭropan Kalendaron. Unue ĝi aperis por la jaro 1977. Ĝia celo estis montri al la infanoj kaj la diversecon kaj la parencecon de eŭropaj lingvoj kaj informi per taŭga formo pri la aliaj landoj de la komunumo, en kiu oni vivas. Apud la taga dato staris ĉiutage simpla desegnaĵo kaj ĝia priskribo/nomo en E-o, en la latina kaj en siatempaj sep oficialaj lingvoj de la Eŭropa Komunumo, krome sur ĉiu semajna folio estis en la samaj lingvoj simplaj frazetoj. La semajnajn paĝojn tutregione diskonigis „Paderborner Spiegel". Bazo de la elektita vortprovizo estis la siatempe uzata lernolibro de Korte: „Sub la verda standardo". La redakcian kaj desegnan laboron plenumis Brigitte Frank-Bohringer de la Instituto pri Kibernetiko.

En 1980 ĉi tiu instituto fariĝis kunaperiganto, la kalendaro ekprezentis dorsflanke la landojn de la Eŭropa Komunumo, kaj Eŭropa Klubo pliintensigis pere de la kalendaro sian agadon por neŭtrala eŭropa lingvopolitiko. 1984 fariĝis kuneldonistoj la Asocio de staĝintoj de la Eŭropaj Komunaĵoj kaj la Laborrondo pri liberala eŭropa lingvopolitiko (ALEUS). La lasta kalendaro aperis por la jaroj 1984-1985 (tiam jam oklingve), poste sekvis longa paŭzo...

Ĝi reaperas por la jaroj 1997 -1998, dank' al la nova ondo de LOI kaj al la kunlaboro de pluraj interesitoj (precipe de la sponzoroj Volksbank Paderborn kaj FAME-Fondaĵo, sen kies financa helpo la nova eldono de la kalendaro ne ekzistus). La vortmaterialon por la kalendaro ni ĉerpis el la menciita lernolibro „Ludu kun ni" de Elisabetta Vilisics Formaggio. Ŝia filino Anna Formaggio faris originalajn, belajn desegnaĵojn. La landaj E-Asocioj de la EU-landoj havigis la tradukojn de la vortoj en 13 lingvojn de la Eŭropa Unio. Sur la dorsaj flankoj de la kalendarpaĝoj aperas freŝaj informoj pri la EU-landoj kaj atendolandoj. Samtempe ĉiu landopriskribo okazas krom en la landa kaj la Internacia lingvoj nun ankaŭ en la latina - la alia neŭtrala lingvo taŭga por la Eŭropa Unio. La antaŭparolon skribis la konata eŭropa politikisto Otto von Habsburg.

Ĉi tie povus finiĝi nia artikolo kun la konstato, ke ni havas novan, belan instruhelpilon. Sed - kiel konate - ne estas problemo fabriki bonkvalitan varon, sed jes ja surmerkatigi ĝin! La kalendaro eldoniĝis komence de julio 1996. Kvankam ni jam duonjaron propagandas ĝin diversloke en Esperantujo, venis la mendoj por nura kvindeko da ekzempleroj! Ĉiu lingvoinstruisto povus uzi ĝin por klarigi la lingvan diversecon de Eŭropo, por eduki al komuneŭropeco. Ĉiu lernanto povus posedi ĝin por montri al la gepatroj, al la konatuloj. Ĉiu esperantisto povus havi ĝin por vidi, kiom la Internacia Lingvo similas aŭ malsimilas al aliaj eŭropaj lingvoj, por informiĝi pri la landoj de EU kaj pri neŭtrala lingvopolitiko. Ĉiu neinstruisto kaj neesperantisto povus aĉeti ĝin por ekscii ion eŭrope aktualan... Kiel konvinki ilin?

„Eŭropa Kalendaro" kostas 10,- germanajn markojn (sen poŝtelspezoj), pageblas al UEA-konto aŭ al bankkontoj en Germanio kaj Italio. La varon kun la fakturo volonte sendos:

***Dr. Vera Barandovska-Frank**, Kleinenberger Weg 16, DE- 33100 Paderborn.*

El la landoj kaj sekcioj

Albanio

La 29-an de marto 1996, en la teknologia mezlernejo en Tiranë okazis ekzamensesio pri E-o - elementa lernokurso. Gvidis ĝin la honora prezidanto de AEL, s-ro doc. Vasil Pistoli. El 16 kandidatoj akiris la atestilon 11 gejunuloj 15-17-jaraĝaj, nome: Erald Hysa, Joana Meçe, Adriatik Dakli, Mimoza Frroku, Saimir Begollari, Silvana Gjata, Brunilda Çeliku, Bledar Xhomaqi, Dritan Kureta, Ira Brari kaj Elona Stringa.

La 24-an de aprilo okazis alia ekzamensesio gvidita de s-ro Zamir Gjurgji, societestro de Tiranë. Akiris la atestilon jenaj aliaj gejunuloj: Elkina Dervishi, Edit Vardhami, Dorina Kuqi, Emiriana Hamiti, Alma Hamiti, Anila Troksi, Sofia Mema (de koresponda kurso). Informis: ***Saimir Beqiraj***

Ameriko

Vojaĝo tra Ameriko *[fragmentoj de vojaĝraporto de Atilio Orellana Rojas]*

[...] En Córdoba, mia hejmurbo, komenĉiĝis la aventuro kaj la plano estis atingi Centramerikon haltante en ĉiu lando survoje tien. [...] La realigeblo ŝuldiĝas al malavara mecenateco de Fondaĵo FAME kaj al sindonema donaco flanke de du amikinoj: Britta Rehm el Svedio kaj Niza Kuitermann el Nederlando.

La unua etapo estis kelktaga restado en Ĉilio kaj la agado komenciĝis en ĝia ĉefurbo Santiago. Estante UEA-komisiito pri Ameriko, novaĵoj abundaj pri la kontinento atingis min ĉiutage kaj interalie mi eksciis pri planoj revivigi Ĉilian E-Asocion dum septembra kunsido realigota en Santiago. [...] La asembleo ne okazis, tamen s-ro Daniel Zanelli venis al la hotelo, kie mi loĝis kaj konigis al mi la avatarojn de ĈEL. En Santiago, Antofagasta de la Sierra kaj Arica mi informis la lokajn amaskomunikilojn pri mia ĉeesto kaj ĉio tio vekis la atenton de la plej legata ĵurnalo en tiu lando: „El Mercurio" ĝis tia grado, ke koninte pri la realiĝo de la 3-a Amerika Kongreso en Kostariko, kien mi min direktis, ties ĉefredaktoro poste dumkongrese faksis al ni por ricevi novaĵojn kaj ekskluzive informi pri ĝi en Ĉilio.

Peruo gastame akceptis min sekve, kaj en Limo mi renkontis la UEA-ĉefdeligiton, s-ron Gustavo Segami Sasaki, kaj la delegiton Julio Zeballos. Ĉi tiu lasta rakontadis al mi pri la E-vivo en Peruo, pri la iama orepoko kaj la nunaj baraktadoj por vivigi la Landan Asocion... [Kaŭze de la pli fruaj teroristaj eventoj kaj la nuna ekonomia krizo la loka esperantistaro perdis la internaciajn kontaktojn] kaj iom post iom perdis intereson pri nia afero. [...] Peruo hodiaŭ prezentas alian vizaĝon, de kreskanta lando, kiu ĉiel klopodas restariĝi post la [terorista] epoko. La e-istoj tie estas nekredeble gastamaj, do ne hezitu plu! Iru tien, ĉar niaj homoj avidaj je internaciaj kontaktoj atendas vin, kaj se vi deziras turismadi, vi trovos belaĵojn kiaj Maĉu-Pikĉu, Kuzko, la ĝangalo aŭ simple belega marbordo kun varmeta akvo. [...]

Varme, peze humide akceptis min Ekvadoro, meze de senfinaj arbaroj de bananujoj, fruktoj, kiuj tiom famigas la landon. Mia restado en Gvajakilo celis specife diskonigon pri la lingvo. Ĉi tiu lando ne eskapis la skurĝobaton de inflacio, senlaboreco kaj, plej aĉe, energimanko. Ĉiutage estas plurhora haltigo de elektra energio ĉie en la lando kaj kaŭze de tio maleblis realigi publikan prelegon pri Esperanto, ĉar salonoj uzeblas dum vesperaj horoj, kiam natura lumo mankas... kaj en mallumo neniu ŝatas kunsidi! Mi malfacile lasas min venki de la situacioj kaj pro tio mi tuj ekvizitis turismajn agentejojn por informadi pri E-o kaj

lasis tie flugfoliojn. Mi iris ankaŭ al amaskomunikiloj kaj konigis al ili mian ĉeeston, kio varme estis akceptata kaj diskonigata.

De Gvajakilo mi flugis al Panamo. Tie atendis min Alejandro Carrasquilla Jiménez, mia perkoresponda lernanto. Li, lia edzino Carmen kaj amika paro (Saadya kaj Omar) decidis eluzi la okazon de mia vizito por plia lernado de la lingvo kaj en ies hejmo estis improvizita klasĉambro, kie mi rektmetode enprofundigis ilin en E-o. Tiu grupo estas plenplena je entuziasmo. Helpe de Amerika Fondaĵo tiuj kvar povis poste ĉeesti la Amerikan Kongreson, kiam ili praktikadis la lingvon en internacia medio. Ili bonvenigos donace legaĵojn kaj lernomaterialon kaj certe ankaŭ kuraĝigajn mesaĝojn de la tuta mondo. Jen ilia adreso: *Apartado 5522 zona #3, Panamá, Republica de Panamá.*

En San José de Kostariko atendis min la plej forta laboro, nome, helpadi en la organizaj taskoj de la Kongreso. La grupo tie konsistas ĉefe el gejunuloj, kiuj estis daŭraj akompanantoj dum diversaj demarŝoj por kongresanoj. La landa gazetaro pozitive akceptis E-on. Jam antaŭ mia alveno 3 artikoloj aperis sub la aŭtoreco de Mag. Hugo Mora Poltronieri. Plie, li, s-ro Antonio Leoni de León kaj mi estis intervjuitaj de la plej grava kaj vaste legata kostarika ĵurnalo[...]

Kaŭze de mia vizito estis gravaj sekvoj en tiu lando: unue estas la fondiĝo de Kostarika E-Asocio, nova Landa Asocio kun juna kaj laborema estraro. Ĝia oficiala adreso estas: *Apartado 4981, CR-1000 San José.* Dua sekvo estas la restarigo de Kostarika Esperantista Junulara Organizo, kies nuna prezidanto estas Rodolfo González Jones. Tria grava punkto estas, ke e-istoj estis vaste informitaj pri ILEI, ili decidis aliĝi kaj fondi Landan Sekcion tie. [...] Sukcesa sekvo de ĉi tiu laboro estas, ke la fama Universitato por la Paco decidis starigi E-katedron en ties sino de la venonta studojaro. La kurso okazos kunordige kun la Universitato de Kostariko.

La lasta lando vizitita antaŭ la Kongreso estis Nikaragvo. [...] En la antaŭmilita periodo la situacio por E-o estis pli favora ol nun. En ĉi tiuj tagoj restas apenaŭaj spuroj de tio. Eddy Silva Molina gastigis min en tre modestaj vivkondiĉoj, tamen en vere familia etoso plena je amikemo kaj bonaŭguraj sentoj. Li kaj Alex Pérez Mendieta daŭre uzas E-on. [Ili lernis la lingvon pere de vortaroj malnovaj.] Ambaŭ avidas ricevadon de legomaterialo, sendebla al ĉi tiu adreso de Eddy: *Clínica Santa María (3 cuadras al sur), B° San José Oriental, Managua 12.* Ili tre ŝatus korespondadi kun eksterlandanoj, sed memoru, ke en Nikaragvo letero eksterlanden kostas same kiel manĝi 4 tagojn, do se vi kontaktas ilin, nepre aldonu respondkuponojn. Instruado en Nikaragvo similis al instruado de Platono en la Akademio: promenante, irante ĉien de loko al loko, rigardante la naturon kaj la urbon por lernado de vortprovizo ligita al iliaj ĉiutagaj agoj kaj lokoj.

Kion diri pri la 3-a Amerika Kongreso? Ĉeesto de reprezentantoj el 18 landoj kaj aktiva laboro de ili en la diversaj sesioj estas la plej valora laŭro al mia laboro plurmonata por subteni realigon de la Kongreso. Mia ĉefa tasko estis la kunordigo

de la tuta Kongreso kaj en la instrua kampo mi gvidis Seminarion pri Cseh-metodo kaj prezidis la Sesion de la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI, krom prezenti Mazi-filmon kaj konsili pri ties uzo. Grava tasko estis la kunordigo de ĉiuj sesioj pri instruado, junulara agado kaj regiona kunlaborado, kiuj estis la ĉefaj aksoj de la Kongreso, kiuj funkciis kiel vera forumo por pritraktado de strategioj sekvendaj por plivastigi la E-mondon en ĉi tiu kontinento.

***Atilio Orellana Rojas**, Argentino*

Brazilo

Ekde 1965 funkcias, kadre de tiel nomataj „kulturdomoj", E-kurso de UFC (*Universitato Federacia de Ceará*). En tiuj kulturdomoj estas instruataj la ling-voj: angla, franca, itala, portugala, rusa, germana, hispana kaj kompreneble E-o.

Jam de tri jaroj mi estas profesia instruisto de E-o, kun ekskluziva dediĉo al la instruado de tiu belega lingvo. Ĉi tie nia kurso daŭras 240 horojn, kiu dividiĝas je kvar ŝtupoj. La tuta kurso estas konsiderata kiel „Baza Kurso de Esperanto".

Jam pasis 30 jaroj. Dum tiu tempo la estraroj de UFC apogis kaj malapogis E-on. Bedaŭrinde en Fortaleza estas granda antaŭjuĝo pro tio ke la nuna estraro de UFC ankoraŭ ne sufiĉe bone konas la gravecon de nia kara lingvo.

Semestre ni enmatrikuligas ĉ. 70-80 gelernantojn, sed ni kalkulas je unusola instruisto, kiu ankaŭ administras la sidejon. Estante sola mi tute ne povas progresigi nian kurson. Pro tio mi petegas al vi skribi gratulleteron al la rektoro de UFC kun kopio al la direktoro de la kulturdomoj, petante, ke ili okazigu novan konkurson cele al dungigo de nova instruisto. Mi opinias, ke se ni havos almenaŭ unu alian instruiston, ni povos baldaŭ oferti eĉ superan kurson kaj prepari ankaŭ novajn profesiajn instruistojn.

Ĉi subas la nomoj kaj adresoj al kiuj, mi petegas, vi sendu leterojn:

Reitor: *Prof. Roberto Claudio Frota Bezerra,*
Av. da Universidade, 2853 - Benfica, BR-60020-180
Pró-Reitor de Extensão: Prof. *René Teixeira Barreira,*
Av. da Universidade, 2932, BR-60020-180
Coordenadora Geral das Casas de Cultura: Prof[a] *Mônica Dourado Furtado*
Av. da Universidade, 2683, BR-60020-180

Kredante je via tuja reago, mi tutkore salutas vin.

Prof. Adelson Andrade A. Sobrinho,
kunordiganto de E-kurso en UFC, Fortaleza, Brazilo

Ĉinio

Esplorado de eduk-eksperimento en lernejoj de Tianjin

La urbo Tianjin, unu el la tri plej grandaj urboj en Ĉinio kun 9 milionoj da loĝantoj kaj 18 registraj distriktoj kaj gubernioj, estas haveno situanta 137 km-ojn de la ĉefurbo Beijing. Ekde la komenco de la politiko „Reformo kaj malfermo" la esplorado de eduk-eksperimento en elementaj kaj mezaj lernejoj de Tianjin prospere disvastiĝas kaj okupas gravan lokon en Ĉinio. Sub la gvido de Tianjin-a

Eduk-Akademio aperas du kategorioj: teoria skolo kaj praktika funkcia modela formo. Ni koncize prezentas ilin jene:

1. La teoria skolo de la eduk-eksperimento

En la lastaj dek jaroj post la fondiĝo de la tutlanda eduk-eksperimenta instituto iom post iom formiĝas kvar skoloj pri eduk-eksperimento en Tianjin.

La unua estas teoria skolo pri *Krea eduk-eksperimento en element-mezaj lernejoj*, kies gvidanto estas d-ro **Zhang Wusheng**, vicdirektoro de Tianjin-a Eduk-Akademio. En 18 distriktoj kaj gubernioj de la tuta urbo formiĝis kelkdeko da eksperimentejoj. La teoria skolo, okupanta firman akademian lokon enlande formiĝis sur la bazo de en- kaj eksterlandaj kreaj eksperimentaj spertoj. Ĝis nun aperis multaj fakaj verkoj pri la eksperimenta teorio en la gazetoj. Efektiviĝis kontakto kun fakuloj pri eduko el Usono, Japanio, Koreio kaj aliaj landoj.

La dua estas teoria skolo pri *Speciala eduk-eksperimento*, ĝia reprezentanto estas prof. **Zhao Shuduo**, Tianjin-a Eduk-Akademio. La skolo studas ĉefe la instruadon de malintelektaj infanoj. Tianjin-aj fakuloj kunlaboras kun d-ro **Chen Yunying** de la Ĉina Centra Eduk-Instituto. En la tuta urbo troviĝas eksperimentaj bazoj por speciala eduko: kelkdeko da elementaj kaj mezaj lernejoj kaj lernejoj por surdmutaj infanoj. Oni ricevis altan takson de la koreaj specialistoj de la Korea Eduk-Scienca Esplorejo.

La tria estas teoria skolo pri *Eduk-eksperimento por supernormalaj infanoj*, kies reprezentanto estas prof. **Yu Shengji** de Tianjin-a Eduk-Akademio. La skolo atingis grandan sukceson en la akcelado de disvolviĝo de supernormala intelekto ĉe normalaj infanoj. La eksperimentaj bazoj estas la Eksperimenta Element-lernejo kaj Yaohua Mezlernejo. Sub la teoria gvido amaso da normalaj infanoj atingis rapidegan disvolviĝon kaj mallongigis sian edukperiodon. Pro tio ili rajtas vizitadi famajn altlernejojn kun altaj poentoj en la ekzameno.

La kvara estas teoria skolo pri *Kontrasta esplorado de eksterlanda eduk-eksperimento*, kies reprezentanto estas prof. **Zhang Qian** de Tianjin-a Eduk-Akademio. Laŭ la kontrasta eduko la skolo resumis la eduk-eksperimentojn de diversaj landoj en la mondo kaj faris kontrastan reformon al la ĉina kaj urba statoj en la eksperimento. Oni kondukas teorian analizon en principo, taktiko kaj apliko de eksterlanda eksperimento.

2. La praktika modela formo de la eduk-eksperimento

Sub la gvido de la teoriaj skoloj oni faris funkciajn studojn. Ekzistas la jenaj eksperimentaj modeloj:

1) *Harmonia eduk-eksperimento de Heping-distriktaj element-mezlernejoj.* Ĝi estas model-formo centre de tri harmonioj „harmonio de instruistoj kaj lernantoj, harmonio de instruado kaj lernado, harmonio de familio, socio kaj lernejo". La eksperimento okazas en ĉiuj elementaj kaj mezaj lernejoj de la distrikto.
Xinhuananlu elementa lernejo estas la plej fama el ili pro sia harmonia eduk-eksperimento en la tuta urbo kaj tuta lando.

2) *Plastika eduk-eksperimento de Nankai-distriktaj element-mezlernejoj.* Oni faris eksperimentan modelon centre de „gvido de plastikaj instruado kaj lernado al la ĉiuflanka disvolviĝo". Ili faris funkciajn eksperimentojn ankaŭ pri instrua reformo de „lerna, instrua kaj ekzamena metodoj" kaj popularigis la reformon en la element-mezlernejoj de la tuta distrikto. La 25-a kaj 19-a mezlernejoj estas famaj tra la distrikto.

3) *Stimula eduk-eksperimento de Hongqiao-distriktaj element-mezlernejoj.* Oni faris kvalitan eduk-eksperimenton centre de la modela formo „stimulado de lernantoj al lerno-intereso kaj ekspluatado de intelekto de lernantoj prenante stimuladon kiel la ĉefa rimedo". *Beimalu* elementa lernejo estas fama eksperimenta bazo en la distrikto Hongqiao.

4) *Mult-vehikla eduk-eksperimento de Tianjin-a Eduk-buroo*
Ĝi signifas, ke instruistoj plenigas klasĉambran instruadon per modernaj ekipaĵoj por altigi la instruan efikon. Binjiangdao mezlernejo de Heping-distrikto, Sranghaidao elementlernejo de Hexi-distrikto kaj Eksperimenta elementlernejo de Hepingdistrikto estas elstaraj inter la lernejoj de la funkcia modela formo.

La esplorado de eduk-eksperimento de la urbo Tianjin enhavas sian trajton en la teoria kaj praktika flankoj. Daŭra profunda esplorado bezonas helpon kaj subtenon de la en-kaj eksterlandaj specialistoj kaj fakuloj. Pere de tiu ĉi artikolo ni celas ekhavi kontaktojn, kaj peti proponojn de diverslandaj specialistoj kaj fakuloj pri eduko en elementaj kaj mezaj lernejoj tra la mondo.

Zhang Qian** kaj **Han Zuwu
Sekcio *Eksterlanda Eduk-eksperimento* de Tianjin-a Eduk -Akademio,
Fukanglu 25, Nankai Qu, Tianjin CN-300191, Ĉinio

Danio

En la dana urbo Århus aktiviĝis la loka grupo post multjara stagnado. Pro manko de propraj instruistoj necesas alvoki ĉiam alilandan instruiston.
La unuan kurson gvidis la „fluganta Cseh-instruisto" *Atilio Orellana Rojas* en aŭgusto 1995. Li ankaŭ prelegis en la ĉefa urba biblioteko pri sudamerikaj indianoj. Rezulte de tiu prelego, tradukita rekte al la dana, estis sufiĉe da aliĝoj por nova kurso. La dua kurso okazis en oktobro 1995. Ĝin gvidis *Aristóphio Alves Andrade* el Brazilo[...] Li instruis ankaŭ la lernantojn de Atilio.
Por atingi ankaŭ aliajn celgrupojn okazis vespera kurso en aprilo 1996. Ĝin gvidis *Katalin Smidéliusz* el Hungario. Al tiu kurso aliĝis ĵurnalisto de la loka gazeto „Århus Stiftstidende", kiu surbaze de siaj spertoj verkis tripaĝan artikolon pri la kurso kaj E-o, nia teksto kaj grandaj fotoj allogis multe da atento inter la legantoj. La sperto de la grupo estas, ke sklava sekvo de la originala Cseh-metodo nuntempe ne plu taŭgas por Danio. La adaptita rekta metodo tamen furoris ĉe la lernantoj. La aktivuloj en Århus esperas, ke ili iom post iom povas revigligi la iamajn famajn somerkursojn en Danio. Pro tio oni serĉas kontaktojn kun aliaj kluboj. Kontaktulo: ***Wolfgang Kirschstein**, Hvedebjergvej 30, DK-8220 Brabrand*

Francio

Laboro ĉe nacia edukado en gimnazio Elsa Triollet de Champigny

Depost novembro-fino [1995], kun la profesorino Gueraz, ni entreprenis laboron en klaso por ne-francparolantaj lernantoj. Temas pri junuloj kiuj ĵus venis el fremdaj landoj kaj apenaŭ scipovas la francan. La originoj estas diversaj, ĉar ili estas: gealĝerianoj, indiano, marokanoj, geportugalanoj, rusino, srilankano, usonano (kiu reiris al sia lando januare) kaj vietnamano.

Tie ĉi ni uzas E-on por vidigi kiamaniere la idiomoj funkcias, kiel formiĝas la vortoj. Samtempe oni, tiamaniere, lernas la I. L.-on kaj iom post iom harmonio instaliĝas. Kiam oni progresas en la nova idiomo, ankaŭ en sia propra lingvo oni progresas kaj evidente ankaŭ en la franca. Ni ofte komparas la diversajn lingvojn kaj tiele edukas la orelojn kaj la prononcon. Dank' al la vietnama ni povas komprenigi kio estas izola lingvo, kie ĉiu lingv-elemento nepre konservas la saman signifon. Jarfine kune kun la profesorino ni ekzamenos nian agadon kaj la rezulton. Ni evidente tre dankas la estraron de tiu kolegio, nome speciale *S-inon **Caillet*** (help-kolegiestron), kiun M.L. jam konis en la liceo Jean Macé de Vitry, *S-inon **Moreau*** kiu respondecas pri la UNESCO-klubo kaj precipe *S-inon **Gueraz*** kiu konsentis pri tiu eksperimento kaj mem aktiviĝas en tiu speciala klaso.

laŭ *Club Esperanto Canaverois, januaro '96*

Germanio-Pollando

Estontaj Cseh-instruistoj translime

- babilado pri la projekta kuirejo de du junulara E-organizoj

loko de la aranĝo: Lubiatów Pollando;	**libertempo entute**: du horoj;
dato:1996/05/15-1996/05/20;	**ludoj**: 5;
nombro de partoprenantoj:14;	**ekzercoj**:18;
meza aĝo: 26 jaroj (enkalkulante la kursgvidantinon);	**responditaj gramatike tiklaj demandoj**: 947;
laborhoroj tage:15;	**metodikaj konsiloj**: 399;

Ĉi tiu statistiko povus taŭgi por la ĵus finita Cseh-metodika, B-grada seminario por estontaj Cseh-instruistoj. Kompreneble neniu el ni nombris la demandojn, nek la metodikajn konsilojn, kiujn donis la kursgvidantino Katalin Smidéliusz, kiu klopodis al ni mirakle malfermi la pordon al la kompreno de la gramatika labirinto.

Imagu, matene ja la tria vi mallaŭte eniras la studĉambron. Kaj tie - kvazaŭ noktaj fantomoj, ankoraŭ diskutas, cirkaŭataj de PIV kaj PAG, junaj poloj kaj germanoj, ĉu traira verba estas la sama kiel transitiva... Ĉu nekredeblaĵo? Nekredeble, jes, sed realeco. (Je la 5-a tiam vizaĝe ili eĉ similis al tiuj fantomoj.)

Daŭre luktante kontraŭ la teoria kaĉo, preskaŭ dronante en ĝi, tamen entuziasme kaj senlace ni elsuĉis la spertojn de nia kursgvidantino. Ŝi infektis nin, pli atente kontraŭbatali niajn idiomajn malĝustaĵojn, kapablis sendormigi nin per hejmaj taskoj kaj dum la seminariaj horoj ne lasis la eblecon, iomete promeni sur

la spuroj de la vojaĝemaj pensoj... „Ankaŭ volas - kaj ankaŭ ne..." damne! Kial denove la ĝusta vorto troviĝas ne ĉe la ĝusta loko?

Ah jes, kaj ni kompreneble eluzis, ke tie estas iu, kiu povis al ni klarigi multon, kiu povis al ni komprenigi, kial ekzemple esceptoj estas esceptoj kaj kial tamen E-o restas logika lingvo.

Ekstere brilis la suno. En la ĉambro ni ŝvitis kaj penis, kapti etan radion, kiu ekheligu la grizan teorion. „Kie en BCK-libro troviĝas..." teorio, teorio. „Kiel vi tion instruus? Montru!" Ne, ni vere ne havis la ŝancon malatenti. La malgranda konkurso pri Andreo Cseh, inventita tiamaniere, ke la germanoj starigu dudek demandojn al la poloj kaj reciproke daŭris ne nur - kiel antaŭe planite - duonan horon, sed tri horojn! Tio certigis profundan eniron en la biografion de Cseh. Dum la antaŭa nokto ambaŭ grupoj aparte sidis kaj elfosis pli malpli malicajn demandojn... dum horoj.

Daŭrigante la statistikon aldonendas: tri el ni plenumis la B-ekzamenon, du montris modelan lecionon por akiri la A-diplomon. Kelkaj el la resto volas skribe persisti kaj dum aŭtuno 1996 denove fari seminarion pri metodiko de instruado kaj finfine la Cseh-B-ekzamenon. Eble tiam en Berlino aŭ Brandenburgio. En ĉiu kazo: por mi la pasinta aranĝo jam estis modela leciono.

***Sabine Trenner**, projekta manaĝero ĉe la E-Junulara Brandenburgio/Berlino*

Hispanio

Viglas la movado en Katalunio

La 10-an de aprilo 1996, s-ro *José Manuel Conde*, la sekretario de la E-Grupo *Jozefo Anglès de Sant Cugat del Vallès* prelegis pri E-o en la **Fakultato pri Tradukado kaj Interpretado de Cerdanyola/Barcelona**. Al la prelego venis 15 gestudentoj de tiu kaj aliaj fakultatoj. El ili 8 aliĝis al la baza Cseh-kurso, sub la gvido de la brazila Cseh-instruisto, s-ro *Aristóphio Alves Filho*.

La E-Grupo Jozefo Anglès, kies prezidanto estas s-ino *Trinitat Garcia*, organizis E-kursojn en la urboj Rubi kaj Sant Cugat. En la unua instruas s-ro Aristóphio Alves Filho, en la dua *José Manuel Conde* havas konversacian rondon.

La 20-an de marto, le Radio Sant Cugat dediĉis 30-minutan programon al E-o kaj intervjuis s-inon Trinitat, s-ron Conde, s-ron Aristophio kaj lian edzinon *Nŭbia Alves*. La 21-an de marto, okaze de la komenco de la kurso en Rubi, la loka televido intervjuis la prezidantinon de la E-Grupo. En majo s-ro Aristóphio disdonis atestilojn al 13 kursfinintoj de Rubi kaj Cerdanyola. La kursfinintoj decidis daŭrigi la lernadon kun la helpo de la instruisto, Josè Manuel Conde.

La 10-an de majo komenciĝis E-kurso en la kulturdomo de Reus. 6 novaj lernantoj kaj 4 esperantistoj ĉeestas la lecionojn, gviditajn de s-ro Aristóphio laŭ la Cseh-metodo kaj kun la vidbendo Mazi.

En Raus, ĉiumarde de la 21-a ĝis la 22-a horo, du e-istoj elsendas E-programon en la radio *Punt 6*. La nomo de la programo estas *Internacia Voĉo*.

En Sant Cugat, ĉiujare okazas la *Aŭtunaj Festoj*. E-istoj ĉiam profitas la okazon kaj faras grandan ekspozicion pri E-o. Ili jam planas la venontan, en oktobro. Se vi emas sendi salutkartojn por montri, ke E-o estas tutmonda fenomeno, ne nur afero de la lokanoj, bonvolu adresi ilin al: ***E-Grupo Jozefo Anglès**, Apartat 336, ES-08190 Sant Cugat del Vallès, Barcelona, Hispanio.*

La publika biblioteko **El Mil. lenari** de Sant Cugat del Valles, en Katalunio disponigis al E-o du grandajn bretarojn. La *E-grupo Jozefo Anglès* jam donacis al ili centon da libroj en kaj pri la Internacia Lingvo. La biblioteko ankoraŭ havas bretojn malplenajn kaj akceptas donacojn. Se vi havas librojn kaj gazetojn, kiuj kuŝas ie, pro manko de spaco en via ŝranko, ni havas lokojn por ili en nia biblioteko. Vi povas donaci ilin rekte al: *Biblioteca El Mil.lenari, ES-08190 Sant Cugat del Vallès, Barcelona, Hispanio*, aŭ sendu ilin al la E-grupo *(adreso supre)*.

Se vi venos al Katalunio, ne maltrafu la okazon viziti la **Hispanan E-Muzeon** (laŭdire, la kvara en la mondo). En ĝi estas granda kolekto da E-libroj, periodaĵoj, insignoj, PM-oj kaj aliaj esperantaĵoj. Ili havas ankaŭ duoblaĵojn kaj pretas interŝanĝi ilin kun aliaj E-organizoj. Jen la adreso: *Hispana E-Muzeo, carrer Zamenhof 12, ES-08739 San Pau d' Ordal, Katalunio.*

Hungario

En majo finiĝis la internacia koresponda E-konkurso memore al István Szerdahelyi. Ĝin denove organizis Géza Kurucz, komisiito de ILEI pri lernejaj konkursoj. Jen la rezultoj:

Bazlernejaj komencantoj (25 konkursantoj): 1. Izabela Anquez (Outreau, Francio); ~ progresintoj (23 konkursantoj): 1. Bernadeta Tóth (Kecskemét, Hungario) kaj Julia Hedoux (Outreau)

Mezlernejaj komencantoj (37 konkursantoj): 1. Etelka Krizsák (Kecskemét)

~ progresintoj (65 konk.): 1. Edmundo Derycke (Boulogne-sur-Mer, Francio)

Plenkreskuloj: 1. Estera Olsen, Norvegio; 2. Jindrich Tomíšek, Ĉeĥio; 3. Maria Molnár kaj Helena Fedor, Hungario.

La sekva konkurso komenciĝos en septembro. Oni povas kiam ajn aliĝi al tiu ĉi konkurso, kiu konsistas el sep taskofolioj.

Aliĝadreso: *Laborkomisiono de ILEI pri lernejaj konkursoj, Gimnazio Júlia Bányai, s-ro Géza Kurucz, Nyíri u. 11. HU-6000 Kecskemét.*

Kubo

Situacio de la E-instruado – *laŭ la raporto de Kuba Esperanto Asocio*

La nunaj landaj kondiĉoj malhelpas la homojn pli aktive partopreni la movadon. KEA serĉas la manieron akomodiĝi al la nova situacio.

Regulaj kursoj: en la plej multaj provincoj ili havis malgrandan rezulton aŭ pro manko de partoprenantoj ne funkciis. Escepto estas *Santiago de Cuba*, kie dum la dua semestro 1995 estis 133 gelernantoj.

Perkoresponda kurso (PKK): en 1995 tiu instrua formo donis multe da novaj membroj por la asocio kaj helpis disvastigi E-on en provincoj, kie alie lernformo ne ekzistas. Nuntempe ĝi havas 150 gelernantojn en diversaj etapoj de memlernado. Tiurilate rimarkindas la laboro de **Gonzalo Collantes** en *Santiago de Cuba*, kie dank' al lia agado 63 personoj aliĝis al la kurso. Menciindas ankaŭ la laboro de **Pedro Pimentel** en *Camaguey*, kie aliĝis 37 gelernantoj. Oni organizas la kurson ankaŭ en *S. Spiritus* (kun gvido de **Norberto Díaz**), *Santo Domingo* (kun **José Luis Montes de Oca**), *Guantánamo*, *Pedro Betancourt* kaj *Santa Cruz del Norte*. En pluraj regionoj - pro personaj kaj organizaj mankoj - la kurso ne funkcias, ekzemple en *Pinar del Rio*, urbo *Havano*, *Las Tunas*, *Holguin* kaj *Granma*. En Kubo pri la instruado respondecas la ILEI-reprezentantoj. KEA decidis transdoni la respondecon de PKK al tiuj lokaj reprezentantoj. Ili ricevas la fotokopiitajn materialojn, kiujn ili devas multobligi proprarimede. Tio signifas, ke la sukceso ne plu dependas de KEA, sed de la loka ILEI-reprezentanto. Ĝuste pro tio oni devas tre singardeme elekti tiujn reprezentantojn. El la raporto de KEA evidentiĝas, ke la sistemo ne ĉie funkciis perfekte.

Distanca kurso: El 37 personoj elektitaj de la Nacia Estraro kaj 12 flanke de la provincaj filioj por tiu kurso nur 20 respondis la unuan demandaron. Al tiuj oni sendis la duan, iom pli malfacilan, sed nur 6 personoj respondis. La trian demandaron ricevis entute 13 personoj. Do oni ne povas paroli pri plena sukceso.

Nacia seminario por instruistoj: La 22-24-an de junio KEA jam la kvaran fojon okazigis seminarion por instruistoj, kiun partoprenis 10 personoj el 7 provincoj.

Porinfanaj grupoj kaj rondoj: oni havas informojn pri sukcesoj en *Santiago de Cuba*, *Santo Domingo*, *Matanzas* kaj *Santa Cruz del Norte*. Estas grave, ke oni envolvu ankaŭ la gepatrojn, ĉar sen ili oni ne povas atingi sukcesojn en la porinfana instruado.

Norvegio

La 13-an kaj 14-an de aprilo 1996 okazis en Oslo pedagogia seminario, kiun gvidis Katalin Smidéliusz. Aranĝis tion la laborgrupo pri instruado de Norvega Esperantista Ligo - ni tion faris ĉar laŭ nia laborplano ni alte taksas la neceson instrui, por ke la movado ankoraŭ ekzistu kaj ke ĝi eĉ kresku. Inter la partoprenantoj estis aktivaj instruistoj kaj instruantoj kaj pluraj instruemaj samideanoj el diversaj partoj de la lando.

La seminario estis precipe praktika. Katalin montris al ni kiel ŝi mem instruas Cseh- kaj alimetode pere de bildoj, ludoj, libroj, vidbendoj kaj uzo de mimiko kaj gestoj. Ŝi klarigis, ke Cseh-instruisto devas esti „klaŭno" por ke ŝi/li estu komprenata bone en kiu ajn lando. Ŝi priparolis ankaŭ la gramatikon. Gravas, ke la instruanto mem bone konu la lingvon por eviti la disvastiĝon de lingvaĉo.

Ni ĉiuj dankas Katalin pro la bona seminario, kiu vere inspiris nin al plua laboro por la norvega E-movado.

***Knut Lyngstad**, studento de la universitato en Trondheim*

Svislando

El la aŭtuna programo de La Chaux-de-Fonds

La 28-an – 29-an de septembro prelegos **Tazio Carlevaro** pri ekstreme aktuala temo: *La streso: kiel eviti kaj superi ĝin*?

La 26-an – 27-an de oktobro prelegos **Ada Fighiera-Sikorska**, ĉefredaktoro de Heroldo de Esperanto. Sabate ŝi prezentos kelkajn sekretojn de la redaktado de Heroldo, dimanĉe ŝi prelegos pri polaj literaturaj Nobel-premiitoj, kun speciala atento pri la aŭtoro de *Quo vadis*?

La 23-an – 24-an de novembro prelegos **Michel Duc Goninaz**, profesoro en la universitato de Aix-en-Provence, komisiita de SAT pri la reviziado de PIV: *Kio do estas lingvo?* Renkontu la posteulon de Gaston Waringhien.

La aliĝo al la kulturaj monatfinoj kostas 60,- CHF kaj ĝi inkluzivas ankaŭ vespermanĝon. En oktobro kaj novembro okazos paralelaj kursoj por progresantoj fare de eksterlanda instruisto, disĉiplo de Katalin Smidéliusz kaj Giorgio Silfer.

Postiers 27 - CP 779 - CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisl. tel/fax (41)39-267407

Recenzoj

Comprehensive English-Esperanto Dictionary,

P. Benson (1940-); ELNA, 1995. 607p. ISBN 0-939785-02-1 (bindita); 0-939705-03-X (kartone).

(Daŭrigo de la recenzo de Mike Sadler aperinta en IPR 2/96)

Kelkaj pluaj esprimoj, kiuj – laŭ mi – impresas anglisme: **Musical instrument** = *instrumento* (ankaŭ Zamenhof tion diris, sed mi preferas muzikilo). **Werewolf** = *lupfantomo* (Zamenhof ankaŭ tion diris, sed mi preferus lupulo, luphomo aŭ similon). **Work up a sweat** (penante ĝisŝvitigi sin) = *levi ŝviton*. **C/o** (adresante al iu ĉe alies adreso) = *zorge de, z/d* (kial ne simple 'ĉe'?)

Kelkaj vortoj impresas min 'malanglisme'. Por **supermarket** CEED donas nur la PIV-an kaj Piron-an, sed de-mi-neniam-aŭdatan *superbazaro*. (Mi eble proponus memservo/memservego, sed ĉiuj ja diras *supermerkato* – eĉ ne la PIV-a *supermarkto*!) Sub **hamburger** CEED kuraĝe proponas *bovburgo*! (Interese, ke post la kapvorto *kastelo* sekvas, interalie, la vorto *burgo* kun sendo al la neologisma apendico kie oni ekscias, ke ĝi estas speco de sandviĉo!)

Iom kurioze impresas la traduko de **tut tut** (riproĉa 'langalveola' klikado) = *ta ta ta* (al mi sonas pli kiel maŝin-pistolo). Kaj ĉu iu ajn neceseja instalaĵo inkluzive la neforfluigajn vere nomiĝu *fekseĝo*?

Por kelkaj el la supraj kritikoj ja eblus argumenti „jes, sed en Usono..." Nu, tutlaste, kiel brito, mi opinias, ke la traduko de la iom eksmoda sed britega esprimo **that' s not cricket** = *tio ne licas* estas malpli bona ol *tio ne justas* (aŭ eĉ *tio ne ĝentlemenas*, ĉar preskaŭ ĉiam virino diras tion pri faro de alia viro).

Majk Sadler, Gyál (Hungario)

Blanke, Detlev: Esperanto kaj lingvistiko - sciencpolitikaj aspektoj.
Blanke, Wera: Fakvortoj en Esperanto - kion fari se la vortaro ne plu helpas? *Esperanto-Dokumente 2, Deutsches E-Institut, Osnabrück 1995. 32 p.*

Ambaŭ kontribuoj atentigas pri la nuna, nekontentiga stato de Eo [=Esperanto - T.D.] kaj pri la riska sinteno de multaj ĝiaj favoremuloj konsidere al - supozata - situacio, ke subite estus postulata de la esperantistaro disponigi Eon po vere internaciskala uzo al plej diversaj fakaj entreprenoj kaj politikaj instancoj.

Konkludante el ĵusaj sociordaj ŝanĝoj en Eŭropo Detlev Blanke opinias, ke ankaŭ rilate al Eo „*la historio estas tute malferma, pli ol iam ajn antaŭe*", kaj ke ankaŭ sur tiu ĉi tereno „*subitegaj ŝanĝoj eblas*" (p. 6). Pro tio la Eo-lingvo-komunumo preparu sin al neantaŭvidata serioza ekinteresiĝo de la ekstera mondo pri la planlingvo, kaj mem estu preta forigi ĝisnunajn malavantaĝojn koncerne seriozan prezentadon de Eo en teorio kaj praktiko.

Aparte maltrankviliga estas „*la neglekto de la gravega rolo de la teorio por la pluevoluigado de la praktika apliko de Eo flanke de multaj gvidantoj de la nuntempa Eo movado*"(p. 7), ĉar sekve de tia manko estas tute vane atendi, ke profesiaj lingvistoj kaj lingvistikaj institucioj iam uzu sian influon al „*decidoj koncernantaj la pozicion de Eo kiel eventuale instruata lingvo en lernejoj kaj universitatoj... kaj ne laste al la apogo aŭ neapogo (resp. kontraŭado) de eventualaj parlamentaj decidoj aŭ interŝtataj konvencioj rilate la pozicion de Eo*"(p.8).

Kiel negativaj signaloj pri la mizera kaj danĝera situacio de Eo flanke de lingvistikaj medioj certe estas rigardataj ekz. neekzisto de faka revuo pri esperantologio kaj ke, ankaŭ sekve de tio, „*kompare al la moderna stato de la lingvistiko la esperantologio estas fortege subevoluinta*" (p.8). Kvankam ja estas verkitaj entute pli ol 320 altlernejaj laborajoj pri interlingvistikaj/esperantologiaj temoj, la koncerna daŭriga scienca aktivado ne estas garantiata resp. postulata pro nerealiĝo de internacia akademia instituciiĝo de interlingvistiko kaj esperantologio. (p. 12)

Resumante la observojn, D.B. atentigas pri la neceso ellabori kaj apliki „*Lingvo-Politikon de la Eo-Movado (LPEM)*", kiu devus direkti sin internen (t.e. en la E-movadon mem) kaj eksteren (t.e. pere de kompetentaj organoj kaj institucioj de la Eo-movado en la neesperantistan sciencan kaj politikan mondon). La terenoj, kiujn skizas la aŭtoro en tiu ĉi listigo de internaj kaj eksteraj LPEM-taskoj meritas seriozegan pritrakton flanke de ĉiuj Eo-movadaj asocioj/ organoj/ institucioj. Alcelinda estus la kreado de internacia instanco, funkcianta kiel internacia lingvopolitika konsilantaro de Eo (p.19).

Kiel kompletigan aldonon al la supre menciitaj LPEM-taskoj oni povas rigardi la kontribuon de Wera Blanke, ĉar ŝi atentigas pri kelkaj gravaj konsiderendaĵoj koncerne la kreadon de novaj fakvortoj sekve de la konstanta eksplodo de scioj kaj la eksploda plimultiĝo de fakvortoj/terminoj (p. 22).

Respondante al la titola demando (*Kion fari se la vortaro plu ne helpas*?), la aŭtorino donas sekvindajn rekomendojn, akcentante (p. 27) interalie la fakan kaj lingvan kompetentecojn de la fakvortkreonto, la motivitecon kaj vortaran ekonomion de la kreota fakvorto kiel la ŝlosilajn kondiĉojn por eventuale - se subite okazos ŝanĝoj favore al minimume eŭropvasta agnosko kaj apliko de Eo - elteni la pezan ŝarĝon, konkurencante kun lingvistiknivele evoluintaj (?) terminaroj de la t.n. grandaj lingvoj. Estus oportune ekipi la diferencigan listigon de la unuopaj kondiĉpretendoj (p. 27.) per konkretaj ekzemploj, ilustrantaj sukcesan aŭ ne rekomendindan kreadon de koncernaj terminoj.

Kondukante la leganton al la ĉefa respondo, W. B. donas superrigardon ekz. pri diversspecaj vortaroj (Esperanto-etnolingvaj, etnolingvaj-Esperanto kaj unulingvaj Esperanto-vortaroj p..23/24), pri glosaroj kaj kelkaj vortlistoj (p. 25/26).

La broŝuro estas aĉetebla ĉe *Germana Esperanto-Asocio r.a., Immentalstraße 3, DE-79140 Freiburg, Germanio*

D-ro ***Till Dahlenburg***
Feldstr. 13, DE-19412 Brüel/Meckl., Germanio, Tel. 038483 / 20528

Carl Støp-Bowitz: La Esperanto-movado.

Historio, organizo, amplekso *(2-a, reviziita kaj kompletigita eldono)*
Eldonis: Norvega E-Ligo, Oslo, 1996.

Por la kandidatoj, pretiĝantaj ekzemple al UEA/ILEI ekzamenoj, ofte la plej granda problemo estas trovi informojn - sufiĉe koncizajn, digesteblajn, tamen detalajn - pri la historio de niaj movado kaj kulturo. Estas tute prave, ke tiuj konoj estas ekzamenataj, sed akcepteblas ankaŭ tiu kandidata riproĉo: de kie ni sciu kiuj faktoj estas la plej gravaj el la vidpunkto de la komisiono.

Krom la ampleksa libro *Esperanto en perspektivo*, kaj aliaj libroj kiel *Gvidlibro por supera ekzameno* de A. Pechan kaj *Esperanto: lingvo - literaturo - movado* de P. Janton, jen nova, konsilinda materialo; 90-paga libreto kun multaj konoj kaj datumoj pri la menciitaj temoj: la manlibro de nia altestimata norvega universitata profesoro kaj akademiano s-ro Støp-Bowitz. La epiteto nova ne tute pravas, ĉar temas pri la aktualigita eldono de la libro el la jaro 1948.

Kvankam la ĉefa celo de la aŭtoro estis helpi siajn samlandajn esperantistojn, tamen krom la ĉapitro pri la movado en Norvegio, la leganto trovas modele internacian trarigardon pri la ideo de internacia lingvo, historio de E-o, movado kaj pri la lingvo mem.

Min persone - ILEI-anon kaj samtempe Cseh-instruiston - vere (mal)ĝojigis kaj forte pensigis la 9-a ĉapitro de la libro, kiu temas pri *la Instruado de Esperanto*. Por la aŭtoro, lerninta E-on dum la kurso de A. Cseh en 1930 en Oslo, restis neforgesebla kaj ĝis nun unika la fama metodo. Mian ĝojon kaŭzas la detala priskribo de la metodo kaj agado de Cseh.

La malĝojo devas esti nia komuna, ja sub la menciita titolo eĉ ne unu vorto estas pri ILEI. Pri ĝi oni povas legi nur 6 liniojn en la ĉapitro pri la fakaj E-

organizaĵoj. Anstataŭ kritiki s-ron Bowitz, mi invitas ĉiun anon de la instruista ligo al sincera memkritiko. Ĉu vere sufiĉe kaj bone ni laboris se nia agado ne estis pli rimarkebla ekster la ligo? ***Katalin Smidéliusz, Hungario***

Eŭropa Poezio en Esperanto

Eldonaĵo *Eŭropa Poezio en Esperanto* pasigas jam sian duan jaron. Ĝi ricevis subtenon de **FAME-fondaĵo**, tial la abonantoj ĉi-jare pagas tri kaj ricevas kvar kajerojn, jarkolekton. Jarabono al Budapest 260, al provincoj 310 HUF, al najbaraj landoj de Hungario 5, al nenajbaraj landoj 7 IRK - inkluzive la poŝtkostojn. Jarkolekto de 1995 kostas 320 HUF, aŭ 5 IRK. En la lasta numero estas belorusa, norvega, slovena kaj hungara paĝoj kun multaj poemoj konvenaj por deklamkonkursoj. Mendu, aŭ petu provekzempleron per 1 IRK (aŭ 80 forintoj en pm.) ĉe ***D-ro Miklós Fehér, HU-1046 Budapest, Ugró Gyula u. 17., Hungario***

(X)

Reagoj al...

Georgo Macioszek: Por la suferanta komencanto - en IPR 2/96

A) Ha, tiuj eternaj komencantoj! Kaj iliaj partianoj, iliaj defendantoj! Ĉu la regnon de E-o mastru kaj estru nepre tiuj kiuj fuŝe prononcas, prolete legas kaj neniam ellernos la lingvon? Do, la potencon al la amasoj da lingvoplebanoj, al balbutantoj kaj malabonantoj? Ne plu suferu niaj komencantoj; prefere suferu niaj progresintoj, ĉu ne? Abunde kaj profunde trafu ilin, vundu ilin, ĉagrenu ilin misoj kaj mizeraĵoj? Ĉu veteranaj lingvanoj do vidu, ke ilia bona E-o reduktiĝas al eltrivitaĵo nur pene komprenebla, apenaŭ kulturkapabla, apenaŭ artkreiva, povra piĝino, primitiva puzlo? Ĉu ili toleru, ke oni faras ĝin komunikilaĉo? Ke la armeoj de barbaroj do tretu, mistraktu kaj detruu ilian belan esprimilon?

Mi multe miras, ke ankaŭ kulturitaj movadanoj, bonaj regantoj de la gramatiko, elektas stari kun sia brila fasado ĉe la flanko de subfosado. Erarojn oni povas pardoni, sed intencan subminadon?

Bone, ni ne kuntreniĝu de niaj sentoj, sed provu sobre konsideri la aferon. Tra la multaj jaroj dum kiuj mi abonis la revuon IPR (inter nombro da aliaj), mi ĉiam denove konstatis, kiom malbone iuj pedagogoj regas la gramatikon de la lingvo kiun - kromfake - ili pretendas instrui, aŭ kiel fervore kaj tutkore ili altrudas siajn opiniojn. Nur en IPR mi renkontis artikolojn pri gramatika temo, kiun la aŭtoroj tute klare kaj evidente mem ne komprenas. Pedagogia revuo devus alporti rimedojn kaj solvojn por kompreno kaj instruo de la reala lingvo. Ĝi ne estu organo por reformoj, por fuŝoj kaj fuŝigoj. Ĉu ne strange, ke por bona pedagogia artikolo pri gramatiko oni turnu sin al literatura aŭ kultura gazeto? (Vidu ekzemple: LF 160, Claude Gacond: "...kaj alio en PIVo".)

Ĉiu skolo havas siajn instruistojn kaj ĉiu lando siajn etnolingvajn influojn. Kiam nia movado disponos internacian lernolibron, unuecan, neŭtralan, lingve laŭreale

priskriban? Ĉu ne estus pli bone, se antaŭ ol proponi simpligojn - simplanime kaj senpripense, sofismajn kaj absurdajn - la komencantoj iom studus? (Ekz. en **Lingvo kaj vivo** la eseon *La akuzativo en interlingvistiko*). Ili studu la lingvon, la movadon kaj la beletron. Ja oni lernu el la spertoj de la paseo, ne flanken ŝovu ties instruojn. La rekomendo de Bernard Golden, same kiel la propono de Macioszek, estas danĝera, nepre kontraŭfundamenta, sed bedaŭrinde povas trovi apogantojn inter senspertuloj, neseriozuloj kaj reformemuloj. La lingvo ne disfalu en demotikan kaj intelektulan versiojn.
Kiu povas kredi, ke mutilita lingvo estus la pli alloga varo kiun ofertu la movado? Ĉu du reguloj anstataŭ unu estas simpligo? Ĉu dependigi la akuzativ-aplikon de vortordo ne eĉ pli hezitigos la parolanton? Ĉu uzi ĉu ne uzi? - jen la demando kiu lin igos freneza kaj skizofrenia. Ĉu la komencanto post staĝa periodo per simpligita versio transiru al matura stadio? Kiam kaj kiel? Ha, tio estos spektaklo! Akrobate malfacila! Aŭ ĉu li trankvile restu komencanto dumviva? Bela perspektivo.
Tia simpligo ne plifaciligas la lingvon, sed faras ĝin primitiva, malpreciza kaj malklara: La fenestro fermas. Kion tio signifas? Ĉu tio estas pli simpla, aŭ nur malklara kaj mallerta? Dua kaj lasta ekzemplo: Ŝi naskis en Bruselo. Ĉu pli simple, se la verbo havas du signifojn? Ĉu ŝi naskiĝis en Bruselo aŭ ĉu ŝi tie naskis infanon? Mi konstante miskomprenus tiajn nekompletajn frazojn. Damne, mi ne volas iri en detalojn. Jam fino!
Kial rabi ĝian precizecon al la lingvo? Ĝuste la angla ne servu kiel modelo. Per tiaspecaj simpligoj oni eble gajnos reformemulojn, sed forpelos seriozulojn. Kiel senhonta, subfosa, perverse renversa propono. La E-movado estas io alia ol konsumisma entrepreno serĉanta klientojn per trompa reklamo. Se ne, por ne plu suferi, mi devus ĉesigi mian abonon al tiacelaj revuoj .

Christian Declerck, Antverpeno

B) Liaj sugestoj pri reformoj tute ne estas novaj, nek originalaj. Ili - aŭ similaj - estas jam multfoje provitaj kaj eĉ eksperimente pruvitaj senvaloraj. Jam multajn fojojn oni tiel proponis, kaj la esperantistaro forĵetis la ideojn.
Kial Georgo sentis sin kompetenta fari tiajn proponojn???
Kial Georgo sentis sin rajtigita fari tiajn proponojn?
Kial Georgo ne esploris pri la historio de tiaj ideoj antaŭ ol proponi?
Gravaj ŝanĝoj neniam estis akceptitaj. Verŝajne neniam estos. Certe ne estas bezonataj. Ĉiu lernanto havas similajn ideojn. Sed ĉu ĉiu eklernanto de la germana lingvo postulas ŝanĝojn en tiu lingvo por faciligi lernadon? Kia egoismo! Kial do proponi en E-o? Mi sugestas, ke Georgo, se li tre fervore sentas bezonon de reformado, kreu sian propran lingvoprojekton kaj aldonu sian nomon al la longega listo de jamaj malsukcesintoj. Sed ne nomu ĝin Esperanto, aŭ iel rilate.
Kontraŭe: Pli spertaj e-istoj nepre devas toleri malpli spertajn. Kaj la malpli kapablajn. Oni ne malestimu fosiston, nek ĉambropurigistinon pro manko de

vortoj. Melkisto kaj komizo havas sian rajton paroli la nacian lingvon laŭ sia kapablo; same la internacian.
Kiu malestimas novan enmigrinton, kiu ankoraŭ ne parolas nian nacian lingvon? Ni tiun helpas, kaj iom admiras maljunulon tian.
Mi mem malestimas la malestimantojn. Mi kritikas la kritikeman pedanton, kiu rikanas aŭ riproĉas pro stumblado de eterna komencanto. Ĉiu pedanto iam estis komencanto. Do TOLERO kaj ne *reformo* estu sur niaj standardoj.
Do, jen miaj amiketoj komencantoj, parolu sen timo. Iam ankaŭ vi povos esti spertulo kaj devos toleri la misparolojn de la komencantoj.

Will Green,
202 Dunkery Road, Nottingham, London, SE9 4HP Britio 0181 851 7420

C) Mi estis esperantisto dum pli ol 65 jaroj, kaj dum mia vivo mi gvidis multajn kursojn por komencantoj, do mia sperto pri lernado kaj lernigo de la lingvo estas vasta. Tial mi volas skribi al vi kaj aserti, ke miaopinie viaj proponoj estas plejparte tre bonaj. Mi tamen volas rimarkigi la sekvanton:
2. Vi pravas pri la finaĵo *-u*, sed tamen kiam oni povas uzi ĝin, *-u* estas tre valora.
4. Por ni, svedoj, tiu ne estas problemo, sed mi plurfoje instruis francojn, kaj bone scias pri iliaj malfacilaĵoj.
5. Mi ne ŝatas vian ideon pri la finaĵo *-in* por ĉiuj verboj. Pli bone forigu *-in* ĉiam, kiam tio estas ebla. Ne estas necese: *instruistino, dentistino, kuracistino* ktp., nur kiam oni bezonas akcenti, ke homoj de ambaŭ genroj partoprenis, oni uzu la finaĵon.
6. Mi ne ŝatas vian proponon pri la landnomoj. Laŭ mi la finaĵo - *io* estas bona: *Svedio, Germanio, Francio* ktp. kune kun *Finnlando, Usono, Argentino*. Dum la jaroj oni tro batalis pri la barbo de la papo en tiu afero.
7. Tre bona propono. Mi ne vidis ĝin antaŭe.
8. Mi havas la saman opinion kiel vi. Ekzistas tiom da stultaĵoj pri tio. Ekzemple la verbo *remi* estas laŭ PIV netransitiva (ĉar la franca verbo estas netransitiva). Do ni ne povas diri: *Mi remas boaton*. Mi demandis multajn, kiel la frazo aspektas en E-o, sed mi neniam ricevis eblan respondon.
Mi donas al vi miajn gratulojn pro via artikolo.

***Ingemar Nordin**, Mosebacke torg 8, SE-116 46 Stockholm*

János Petik: Serve de altaj pretendoj - en IPR 4/95

La greka kaj latina estis/estas sufiĉe „perfektaj" - onidire... kaj bone uzitaj sen UNU, eĉ sen LA! Eĉ mankis JES en ili... La harfendajn frazojn de Petik eblas bone esprimi en normala (ne Petika) E-o, kaj li ne devas (ankaŭ neniu) transformi E-on laŭ sia/onia genta gusto! Li bv. helpi ekzemple al la francoj, kiuj havas nedifinan artikolon (ĉu bezonas E-o ankaŭ en pluralo - *j'ai des amis* = mi havas amikojn???); do li ne konsideru nur hungarajn bezonojn (slavoj ankaŭ ne bezonas UNU, ktp. ktp.) Malnova frenezaĵo en Esperantujo (dekomence) ĝustigi E-on al laŭgentaj lingvaj kutimoj, bezonoj. Ankaŭ teorie tio estas naivaĵo; malgraŭ la tiaspecaj diferencoj, ĉiuj lingvoj estas bonege uzeblaj por la plej altaj bezonoj (tio

vere ne koncernas la poeziajn „bezonojn" - sed tie estas sfero de senlima manifestiĝeblo).

Ankaŭ liaj pensoj kaj ekzemploj pri la vortordo ŝajnas naivaj, kaj liaj postuloj (Vi iras kien? - frazofine akcenti!) ne estu „reguloj". „Vortorda anarĥio" ekzistus laŭ liaj „reguloj"; same li ege eraras skribinte, ke la hungara kapablas esprimi la plej delikatajn nuancojn de la homa animo, pli perfekte ol aliaj lingvoj... Tio estas ekzemplo de ŝovinisma orgojlo de iu, kiu certe neniam provis traduki hungaren poemojn francajn, ŝercojn norvegajn, Ŝekspirajn malfacilaĵojn, ktp. Mi esperas, ke alinacianoj ne tro ataku pro tiu naiva aserto - degradante aliajn lingvojn - hungarojn, aŭ IPR - vin, redaktoron. ***Ervin Fenyvesi***, Hungario

Korektoj al la artikolo de János Petik IPR 4/95
p. 32. linio 12-a desube: anstataŭ la vorto „frazkomence" legu „frazkomente".
p. 33. 1-a linio: anstataŭ „el un romaneto" legu „el la romaneto".

NdlR - nun sekvu du pliaj reagoj, kiuj strikte ligiĝas al la supraj artikoloj.

Debato inter la legantoj

Pluraj artikoloj lastatempe uzis la paĝojn de IPR por sondi aŭ pledi por enkonduko de ne- aŭ kontraŭfundamentaj ŝanĝoj en E-o, en nia instruado kaj instruiloj. Estas tempo starigi debaton pri tio inter la legantoj (la membrarode ILEI) kaj en ĝia komitato/estraro. Ni faros tion en Tábor, cele al gvidlinio al la redakcio por IPR kaj por aliaj estontaj eldonaĵoj (precipe instruiloj) de la Ligo. Reformemuloj rajtas je demokrata podio, sed ĉu IPR havu la taskon liveri tion? Ke niaj lerniloj ne estu eksperimentejoj, ŝajnas jam preter-diskuta, sed precize kian Esperanton ili prezentu? Stariĝis jam en Nederlando organizaĵo por reformemuloj; ĉu ĝia organo kaj agado ne provizu tian forumon? Nur kiam modifemulo konvinkis ĉiujn siajn samspecianojn, tiu ekturmentu nin ceterajn. Ĉu IPR malakceptu rekte tiajn artikolojn (kial antaŭe), ĉu iagrade allasi ilin (levante la demandon, kio estas kontraŭ- kaj kio nur ne-fundamenta), aŭ ĉu cent floroj floru kaj elbatalu siajn niĉojn? *Kontribuu vian opinion ankaŭ sur la paĝoj de IPR.*

Stefan MacGill, komisiito pri eldonado

Organizita ŝanĝo de Esperanto ne havas ŝancojn

Multaj lernantoj de E-o travivas periodon dum kiu ili forte sentas la mankojn en la lingvo. Kelkaj rapide trakuras la periodon, al aliaj ĝi povas daŭri longe, eĉ dumvive, aŭ esti ripeta. Strange, ke tio ne okazas al lernantoj de aliaj lingvoj. Ĉu tio okazas, ĉar E-o estas pli malperfekta? Certe ne, ĉar la etnaj lingvoj estas same aŭ pli malperfektaj. La pli multaj uzantoj forlasas la reformeman periodon, kiam ili ekkonscias pri la veraj eblecoj (aŭ neeblecoj) ŝanĝi la lingvon. Ni vidu, kiaj estas la realaj eblecoj.

En la jaro 1894 okazis referendumo pri tio, ĉu oni entute enkonduku ŝanĝojn en E-on. La opinio por neŝanĝo gajnis per klara majoritato. Jen jam la unua stumblilo. Kiu ajn propono por organizita ŝanĝo senplue skismigus la e-istaron en du partiojn. Unu dirus, ke ni kompreneble ne estas ligitaj de referendumo okazinta antaŭ cent jaroj kaj cetere kun tre malmultaj partoprenintoj. Alia objetus, ke ni estos ligitaj de tio, ĝis kiam ni havos novan referendumon kaj tiu prezentus netransireblajn praktikajn malfacilojn pro la nuntempa dissemiteco de la e-istoj. Kaj se ni nur iom konas la historion de E-o, t.e. la historion de la esperantistoj, ni scias, ke tio ĉi jam estus sufiĉa motivo, por ke ili sin ĵetu al la kolo unu de aliaj, kaj tion ili farus ne ame kaj amike, sed kun krifiĝintaj ungoj.

Restas do aliaj eventualaj eblecoj, nome ke iu aŭtoritato provos devigi ŝanĝojn. Tion provis komitato en la jaro 1908, sed kvankam ĝi enhavis sendube talentajn homojn kaj eĉ korifeojn kiel ekzemple la inteligentan, energian kaj respektatan de Beaufront, tiu komitato finfine malsukcesis. Se iu farus similan provon hodiaŭ, oni povas eĉ pli certe antaŭvidi saman rezulton pro tio, ke nun la inercio de la lingva komunumo estas eĉ pli granda pro ĝia plia radikiĝeco.

Ankaŭ alian kazon oni povas studi, nome la aferon kiam la Akademio de Esperanto provis devigi sian interpreton de la participoj al la e-istaro. Estas tre dubinde, ĉu iu ajn ŝanĝis sian lingvouzon pro tiu interveno.

Teorie politika instanco povus ŝanĝi la lingvon per iu kabineta decido kaj dekreto, sed se tiu instanco ne pretus apogi sian decidon per celkonscia uzo de grandegaj monsumoj, ankaŭ ĝi certe malsukcesus. Se oni konsideras nur la kapablon kaj inklinon de politikistoj elspezi alies monon, oni povus kredi je sukceso. Sed, se oni aliflanke rigardas ilian mizeran kapablon interkonsenti eĉ pri plej simplaj aferoj, oni tuj komprenas, ke tio estas neirebla vojo.

Tamen ekzistas vojoj praktikeblaj kaj etike akcepteblaj. La unua estas tiu, kiun Zamenhof rekomendis, nome iom-post-ioma ŝanĝado. Neniu ajn (krom redaktoroj kaj eldonistoj, kiuj prave havas rajton) povas malpermesi al iu ajn diri aŭ skribi „Ŝi kovrante per kisoj li ŝi ardas por li" anstataŭ „Ŝin kovrante per kisoj li ŝin ardigas por si". Se nur sufiĉe multaj dum sufiĉe longa tempo faros tion, certe ĝi fine estos akceptita. Sed ĉu tia ŝanĝo vere valoras la penon? Verŝajne ne, sed malpli drastaj ŝanĝoj en la lingvo povas efektiviĝi tiamaniere.

Ekzistas eĉ alia vojo. Ne faru kiel Zamenhof rekomendis, sed faru kiel li faris. Verku libron pri la propono. Presigu kaj dissendu ĝin proprakoste. Tiel havigu adeptojn. Organizu kaj kuraĝigu. Se vi ne nomos vian proponatan aferon E-o, vi agos nek kontraŭ leĝo, nek kontraŭ deco. Tio ĉi ne estas ironio. Zamenhof sukcesis kiam li agis tiel, kaj ankaŭ alia povas same sukcesi. Sed en tia kazo, kial limigi sian ambicion al kelkaj gramatikaĵoj? Kial ne ambicii al absoluta perfekteco? Ĉar finfine, kiu volas oferi preskaŭ sian tutan vivon por ŝanĝi kelkajn gramatikaĵojn?

Sed sukceso de organizita ŝanĝo de E-o interne de la nuna uzantaro estas senŝanca, eĉ pli senŝanca ol estus simila ŝanĝo de etna lingvo, ĉar super la

parolantoj de etna lingvo ofte troviĝas instancoj, kiuj havas la necesajn potencrimedojn por devigi homojn al io ajn. La senŝanceco tamen dependas ne de tio, ke la ŝanĝoproponoj estus malbonaj kaj la proponanto megalomania. Ĝi dependas tute ne de lingvistikaj, sed de sociologiaj faktoroj.

La tasko de IPR devus esti esplori kaj debati kiel instrui E-on, eĉ esplori E-on mem por konsciigi, precize kion instrui. Kaj al la taskoj de didaktiko ĉu ne apartenas ankaŭ la tasko en delikata maniero indiki al la lernantoj laŭ kiuj vojoj E-o ĝis nun ŝanĝiĝis kaj la antaŭkondiĉojn de pluaj ŝanĝiĝoj?

Bertil Nilsson, Svedio

Forumo

Esperanto en ĉiuj lernejoj kaj universitatoj tra la mondo

Ĉu revo? Ĉu utopio? Ne. Sed efektivigebla realaĵo, kiu dependas nur de la e-istaro kaj laste de la registaroj. Tio povos okazi post du aŭ tri jaroj se ni, de nun, komencas sisteman laboron por informi la politikistojn kaj la kulturajn instancojn en niaj urboj, pri la atingoj de E-o en la mondo kun fidindaj informoj. Se ni, en la tuta mondo, bombardos ilin per monataj informiloj, nepre en naciaj lingvoj, kaj se ni estos konstantaj en tiu agado, mi certas, ke post du aŭ tri jaroj, ili vidos, ke E-o vere funkcias, kaj ili prenos la decidon (Kiun ni ĉiam sugestos en niaj informiloj), enkonduki E-on en lernejojn kaj universitatojn.

Eble vi demandas, kiuj instruos? Tio ne estas problemo, ĉar oni povas, en la daŭro de kelkaj monatoj, prepari novajn E-instruistojn, kaj ne forgesu, kiam la politikistoj decidas, ili trovas la necesajn rimedojn. Krome, la lingvaj instruistoj en la mondo, facile lernos E-on, ĉar se ili instruas naciajn lingvojn, kies gramatikoj estas neregulaj kaj malfacilaj, ili kapablas senpene lerni la lingvon internacian.

Nia tasko estas prepari kelkpaĝajn informilojn nacilingvajn pri E-o kaj ĝiaj atingoj en la mondo. Estus interese, se en ĉiu lando ni havus grupeton da homoj, kiuj prenos la E-gazetaron kaj apartigus la plej gravajn novaĵojn por traduki ilin nacilingven. Poste tiuj homoj devas sendi kopiojn al E-grupoj tra la lando. La E-grupoj havos la taskon multobligi la materialon kaj sendi al la kulturaj instancoj en la urbo/regiono (bibliotekoj, universitatoj, lernejoj, edukaj ministroj/departementoj, kulturdomoj, urbestroj, k.a.).

Ĉu granda laboro? Ne. Ĉar temas ne pri preparo de gazeto kun diversaj artikoloj, sed ĉefe pri traduko de okazintaĵoj, kiuj montras, ke la E-movado viglas ĉie en la mondo, kaj ke E-o estas vivanta lingvo. Gravas nur, ke ni zorgu pri prezentado de la informoj, kiuj devas esti bone tajpitaj sen gramatikaj eraroj. Ni povas peti al iu gramatikisto por korekti la tekstojn. Inter la e-istoj troviĝas tiaj profesiuloj. Ĉu ne? Ĉe la mano de la e-istaro estas la disvastigo de E-o kaj ĝia enkonduko en ĉiujn lernejojn kaj universitatojn tra la mondo. Ni rompu la ŝelon

kaj eliru el ĝi. Ni bezonas perdi la timon montri al la homaro, kio estas E-o kaj diri, ke ni fiere estas e-istoj.

Kion pensas la e-istaro pri tio? Mi tre ŝatus korespondi kun aliaj e-istoj, kiuj samopinias kaj ankaŭ kun kontraŭuloj. Tial mi aldonas mian adreson en Brazilo, kien mi devas reveni post mia longa vojaĝo, kiu baldaŭ finiĝos.

Aristóphio Andrade Alves Filho, *Conj. Benedito Bentes 1, R. B-55 nr. 85, 57084-040 Taboleiro dos Martins, Maceio BR- (AL) - Brazilo*

Pedagogiaj materialoj serĉataj

Mireille Grosjean, instruistino de la franca kaj germana lingvoj en Svislando petas la helpon de la legantoj. Ŝi profesie okupiĝas pri klasointerŝanĝoj kaj tiel ŝi kunlaboras kun laborgrupo de la universitato de Neuchâtel/Neuenburg (CH) nomita „L'éveil au langage" (vekiĝo lingven). La anoj de tiu grupo alvenis al la observo de tiu tikla momento, kiam la lernanto devas distanciĝi de sia denaska lingvo. La komitato esprimis sian deziron aŭskulti ŝian prelegon pri E-o kaj pri diversaj spertoj faritaj per ĝi. La decidopovaj instancoj konsultas tiun grupon por organizi la instruadon de fremdaj lingvoj en Svislando. Do, temas pri gravega afero. La prelego de Mirejo okazos dum la vintro 96-97. Ŝi petas la legantojn sendi al ŝi raportojn, informojn, kiuj enhavas la plej novajn rezultojn kaj spertojn. Ŝi preferas raportojn de neŭtralaj, neesperantistaj instancoj kaj ne ŝatus ricevi longegajn librojn pri la temo. Indiku la nombron de la paĝoj en via propono. Adreso: *Mireille Grosjean, pf9, CH-2416 Les Brenets, Svislando*

Leterkesto

„IPR 4/95 estas aparte multedira, kaj plurdirekte pripensinda. I.a. plaĉis al mi, kiel tre utilaj, la frazoj en la gramatika testo de Kurucz, iom pli ol la ideoj de Matthias, kvankam tute ne malgravaj. Por ni, hungaroj, la problemoj de Rulofido, ŝajnas eble arbitraj, verdire, min neniel povas „tuŝi" liaj problemetoj; ja nia lingvo feliĉe havas klaran akuzativon, la germanoj „apenaŭ". Sed la plendado de Petik estas antaŭ mi vere terurаĵo..."

Ervin Fenyvesi, Hungario

„Nin ĝojigas la fakto, ke vi regule adresas al ni vian informilon. Por ni ĝi estas vaste utila, ĉar ĝi helpas nin akiri ne-malhaveblajn sciigojn, kiujn oni ne ĉiam publikigas aliloke... Ni tre ŝatus daŭre ricevi vian ligilon... [por] teni bone informita nian anaron." ***Juan Ramón Rodriguez Gomez***, *Kuba Esperanto-Asocio*

„Kun granda interesiĝo mi legis en IPR 2/96 esperigan citaĵon el la Bulteno de la Albana ILEI-Sekcio (laŭ informoj de Bardhyl Mezini).
Ĵus reveninte el Albanio, kie mi - akompane de profesoro pri okulkuracado - vizitis la Oftalmologian Fakultaton en Tirano kaj kvinopon da malsanulejoj por renkonti okulistojn, mi povas atesti pri tio, ke apenaŭ ni kontaktiĝis kun kuracistoj, kiuj parolas ne-albanan lingvon... Ĉie ni bezonis la intervenon de interpretisto, kiu devis asisti nin dum nia 'marŝado' tra hospitaloj kaj poliklinikoj.

Laŭ mia juĝo la tempo por 'verda eksplodo' en tiu lando estas matura. Jam post la unuaj horoj de mia dektaga restado mi estis disdoninta ĉiun E-materialon, kiun mi havis ĉe mi! Ho, nia bona lingvo estus ideala solvo, kiu multe servus al mi en mia energia klopodado okulkurace kaj optike helpi al la plej malriĉaj homoj en lando, kies popolo tiom longe, tiom multe suferadis! En pluraj lokoj oficialuloj min certigis, ke ili ĉiel helpus al iniciatemuloj disvastigi E-on kaj startigi kursojn... Konklude, mia impreso estas, ke la informoj de s-ano Mezini estas ĝustaj kaj sekve atentindaj. Albanoj, fosu vian sulkon!"

Jacques Tuinder, Henegouwenlaan 35, NL-1966 RH Heemskerk

Postparolo

Responde al mia alvoko en IPR mi ricevis stokon da malnovaj IPR-oj de franca samideano, René Villégier el Aix les Bains. Koran dankon! Nun mia kolekto estas preskaŭ kompleta. Sed nia redakcio regule ricevas petojn de ILEI-anoj, kiuj same ŝatus kompletigi siajn jarkolektojn. Mi entreprenas, ke **mi kolektos la ne plu bezonatajn IPR-numerojn**, kiuj kuŝas ie en ŝrankoj aŭ subtegmentoj **kaj mi sendos ilin al tiuj anoj, kiuj havas mankhavajn kolektojn**. (Se iam mi transdonos la redaktorecon al alia persono, mi heredigos ĉion al mia posteulo.)

Pluraj ILEI-anoj plendis ĉe mi, ke IPR atingas ilin tre malfrue, kelkfoje eĉ du monatojn post la redaktofino. La estraro de ILEI okupiĝis pri tiu temo en Tábor kaj decidis pri kelkaj ŝanĝoj. Ankaŭ mi traktis pri la temo kun kelkaj estraranoj kaj Flandra E-Ligo. Mi interkonsentis kun Paul Peeraerts, ke mi kolektos la eventualajn plendojn. Tiel mi havos superrigardon pri la alvendatoj en la unuopaj landoj kaj mi regule povos informi la sekciestrojn, la presejon kaj nian estraron pri la problemoj. S-ro Peeraerts skribis al mi, ke en normalaj cirkonstancoj unu semajno sufiĉas por presi, kunmeti, vinkti, enkovertigi kaj ekspedi la revuon. Do, mi proponas, ke **tiuj plendu ĉe mi, kiuj proksimume unu monaton post la redaktofino ne ricevos la revuon**. Redaktofino signifas por mi tiun tagon, kiam mi presas kaj enpoŝtigas la revuon. En la postparoloj vi ĉiam trovos tiun daton.

Brazila ILEI-ano asertas, ke la adresoj de nia **armenia** kaj **hindia reprezentantoj** sur la tria kovrilpaĝo ne estas kompletaj. Mi petas tiujn reprezentantojn (aŭ tiujn, kiuj povas helpi nin ĉi-terene), sendu al ni la mankantajn informojn.

En la sekvaj numeroj aperos: Recenzo pri la kompakt-disko *Ni vojaĝu* de Paul Gubbins; Kent Jones: *Enkonduko de Esperanto en usonajn lernejojn*; M. Grosjean: *J.H. Pestalozzi naskiĝis antaŭ 250 jaroj.*

Pro la lastmomenta alveno de la konferencaj materialoj kaj la kvartaga nacia festo en Hungario mi povis sendi tiun ĉi numeron al Belgio nur **la 21-an de aŭgusto**. Planita redaktofino de la sekva numero: la 31-a de oktobro.

Jozefo Németh, redaktoro

SEKCIESTROJ de la LIGO

Albanio: Bardhyl Mezini, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, Tirana
Argentino: Teresita Alaníz, Hipólito Yrigoyen 2578 P5 Dto 30, AR-1090 Capital Federal
Aŭstrio: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien
Belgio: Raymond Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende
Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106-010 Sao Paulo (SP)
Britio: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD
Bulgario: Kiril Velkov, D. Todorov 9, BG-3000 Vraca
Ĉeĥio: Miroslav Malovec, Bosonozská 15/10, CZ-625 00 Brno
Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan
Estonio: Eve Otsa, Liivalaia 30-12, EE-0001 Tallinn
Finnlando: S-ino Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, FI-69440 Lestijärvi
Francio: Fernand Micoud, 8 rue des Maures, FR-69320 Feyzin
Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn
Hungario: Anikó Gönye, Ifjúmunkás u. 4. III. III/12, HU-1019 Budapest
Israelo: Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Italio: Catina Dazzini, C.P. 22, IT-54100 Massa
Japanio: Masumi Suzuki, Inokashira 3-5-12, Mitaka-shi, Tokio, 181 Japan
Koreio: So Jin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900
Kroatio: Ivan Bekavac-Basić, Kuŝlanova 59, HR-10000 Zagreb
Kubo: H. Jiminéz, Vista Alegre 254 e/J.B. Zayas y Luz , Caballero, Víbora, CU-11500 C. Habana
Nederlando: Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL-1704 BH Heerhugowaard
Nordameriko: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono
Norvegio: Björn Thuv, Aröyveien 33, NO-3135 Torod
Portugalio: João Santos, p-a Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. João Couto 6 r/c A, PT-1500 Lisboa
Rumanio: Prof. Popa Florica, Str. Eroilor 29, ap.7, RO-1900 Timisoara
Ruslo: Irina Gončarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000
Sanmarino: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, SM-43031 San Marino.
Slovenio: Sonja Tavčar, Liminijanska 6, SI-66320 Porotoroz.
Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby
Svislando: Mireille Grosjean, Rue du Temple 20., CH-2416 Les Brenets

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, Erevan
Aŭstralio: Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney, SA 5069
Bangladeŝo: Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000
Centrafrika Respubliko: Luc Feidangai, B.P. 70, Bangui
Ĉilio: Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago
Hindio: Abani Halter, Jamboni, P.O. Bolpur 731204, W. Bengal
Irano: Mohammad Karamudini, P.O. Box IR-13445-747, Teheran
Islando: Loftur Melberg, Skolabraut 1, IS-220 Hafnarfjördur
Jugoslavio: Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak
Kostariko: Jorge A. Leoni de León, Apartado 7603, CR-1000 San José
Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius
Niĝerio: Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Epoma Bendel
Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.
Pollando: p/a Silezia Esperanto-Asocio, ul. Dubois 3, PL-50-952 Wroclaw
Slovakio: Anton Zachariás, Sobotské námestie 6, SK-05801 Poprad.
Sud-Afriko: vakas
Tanzanio: Mramba Simba, S. L. P. 1051, Bunda Mara
Togolando: Afantchao-B.Yao, B.P. 20225 Lome
Ukrainio: Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UA-253222 Kiev
Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, UZ-700000 Taŝkent, CIS
Venezuelo: Prof. J.E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A
Zairio: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre)

LABORKOMISIONOJ

Didaktikaj ludoj: Georges Sossois, rue du Basson 79, BE-6001 Marcinelle, Belgio; tel. (+32 71) 43 62 05.

Ekzamenoj: prez.: Atilio Orellana Rojas (adreso, kovrilo 2). Sekretario de elementa kaj meza niveloj: d-ro Ivan Bekavac-Basic (adreso, kovrilo 3)

Eŭropa Komunumo kaj informado en pedagogiaj medioj: Raymond Wylleman

Gazetara servo kaj informado: *vakas sed pretas kunlabori:* Germain Pirlot, Steenbakkerstr. 21, BE-8400 Oostende; tel. (+32 59) 70 87 00 kaj Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien, Aŭstrio; tel. (+43 222) 36 86 29.

Konkursoj lernejaj: Géza Kurucz, Nyíri u. 11, HU-6000 Kecskemét, Hungario.

Lerneja kontaktigo kaj statistikado: Provizore plenumata pere de *Juna amiko.*

Statuto: Rob Moerbeek kaj Hans ten Hagen

Terminologio: Maŭro La Torre, Viale Bardanzellu 117, IT-00155 Roma, Italio

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO: (rilatoj de reciproka informado, kat. C): Place Fontenoy, FR-75007 Paris. Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, FR-75010 Paris

UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.

IEI: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag.

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

La membreco inkluzivas ricevon de kvar numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto:

Kasisto de ILEI: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby, Svedio; poŝtĝirkonto 682117-7 (Stokholmo). Membreco kostas 80 svedajn kronojn en landoj sen sekcioj kaj 100 SEK en landoj kun sekcioj (la sekcio ricevos la diferencon). Simpla abono sen membreco (por E-societoj, bibliotekoj k.s.): 30 NLG.

Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA:

UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago kaj la internan konton de ILEI: *ilek-a.* aŭ por *Juna amiko*: *juna-l.* Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago. Membreco: 20 GLD en landoj sen sekcioj, 25 GLD en landoj kun sekcioj.

Hungara ILEI-sekcio: (adreso: tria kovrilpaĝo) akceptas pagojn en hungaraj forintoj de reform-ĉuropanoj por membreco kaj aliaj servoj de la Ligo.

KONTRIBUAĴOJ AL IPR

Kontribuaĵoj al IPR estu laŭeble nete tajpitaj per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, taŭga por aŭtomata komputila enlego, aŭ surpapere prespretaj. Livero sur IBM PC-kongruaj disketoj (5,25 aŭ 3,5 colaj) bonvenas. Adreso de la redakcio sur la kovrilpaĝo. *Katalin Smidéliusz*, nia vicredaktoro, estas atingebla ankaŭ tra komputilreto. Ŝia adreso: smidik@fs2.bdtf.hu. Vi povas atingi la redakcion ankaŭ telefakse. (La teĥnikajn detalojn vi trovas en la Postparolo de la 96/2-a numero de IPR.) Fakaj artikoloj prefere ampleksu 3 ĝis 8 presitajn paĝojn. Pedagogiaj novajoj, informoj pri edukaj aranĝoj, interŝanĝaj gazetoj kaj leteroj al la redakcio bonvenaj. Ni recenzas nur ricevitajn eldonajojn iel rilatantaj al edukado aŭ utilaj en instruado.